

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



**Kiu zorgas pri Ameriko?
Rekomenco en Slovakio
Koreio post la UK**

**De Diego tostas
je vortarego**

Enhavo

- 61 Esperanton sufokas tro multaj iluzioj (intervjuo de Antonio Valén kun Fernando de Diego)
- 62 Tradukoj kaj aliaj verkoj de Fernando de Diego
- 64 Ameriko: Kiu zorgas pri Ameriko? (Atilio Orellana Rojas); Kolombio: La ŝarĝo de espero (Philippe Chavignon, Santiago Álvarez); Brazilo: Ĉu UK en 2001?
- 66 Azio: ĈRI 30-jara; Koreio: Kio post la UK?; Japanio: Transjare, transmare; Papero kaj kapsiko (Tutomu Nisio); Signoj de azia solidaro
- 68 Eŭropo: Slovakio: Unu fino, unu komenco; Informa ondo en Albanio (Bardhyl Meziñi)
- 69 Reagoj
- 70 Informado: Ni eliru el la kaŝejoj (Wouter F. Pilger); Kontraŭ kalumnioj (István Ertl)
- 71 Foliume; La diligenta kolegaro: Survoje al pluiro
- 72 Recenzoj: *La respubliko* (Eugène de Zilah); *Hanako lernas Esperanton* (Reza Ĥejr-Ĥah); *Being colloquial in Esperanto* (Anna Löwenstein); *Vojaĝoj kaj aliaj poemoj* (Willem Verloren van Themaat); *Poemoj de Armand Su* (Sabira Ståhlberg)
- 75 Laste aperis
- 76 Loke – Fake – Persone
- 80 Nekrologoj; Anoncetoj; Oficiala informilo

Vi trovos

vin konfrontita al diklitera diagnozo de Fernando de Diego pri la iluziemo de la Esperanto-movado (ĉi-dekstre). Li mem ŝajne delasis la iluziojn, kaj realigas anstataŭe — siajn revojn. Por sia 75-jariĝo, ekzemple, li regalis sin per giganta vortaro hispana-Esperanta, kostinta al li senĉesan laboradon de “kvar jaroj, unu monato kaj kvar tagoj”. Sed kiu nin regalos per ties eldono, kaj ĉu post malpli ol “kvar jaroj, unu monato . . .”?

Sindona laborego — tiu de *Donald Broadribb* — necesis ankaŭ por la elstara esperantigo de la Platona *Respubliko*. Se ĝi estas “verko nepra por kulturlingvo”, kiel juĝas E. de Zilah (p. 72), kial do ĝi trovis ĉe UEA nur 19 aĉetantojn dum pli ol jaro?

“Papero kaj kapsiko” simbolas du landojn historie forte ligitajn, kiujn disigas nur mallarĝa maro kaj . . . memoroj de turmenta pasinteco. Trovu sur p. 67 pri kiuj landoj temas, kaj kiel e-istoj lanĉas tie iniciaton potenciale tutmondan.

La kovrilo: Fernando de Diego (dekstre) ŝultroprenas sian fraton Óscar, kiu surŝultrigis multajn helptaskojn dum la pretigo de la vortaro.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 436 10 44; 436 15 39.

Telefakso: (010) 436 17 51.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, reprezentado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. +44/(0)181/542-03-02; fakso 715-40-10.

Vicprezidanto (landa kaj regiona agado): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, DE-51069 Köln, Germanio; tel. +49/(0)221/680-32-50.

Ĝenerala Sekretario (informado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark T. Fettes, 158 A Henderson Avenue, Ottawa, Ontario, Kanado K1N 7P6; tel. +1/613/565-92-82; fakso 565-92-79.

Estrarano (financo): s-ro Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; tel. +31/(0)20/642-18-53.

Estrarano (azia agado): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul — 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj fakso +82/(0)2/646-54-13.

Estrarano (kulturo, kongresoj): s-ino Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39/(0)6/39-72-61-98; fakso 39-72-61-69.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ino Marija Belošević, Sveti duh 130, Črnómórec, HR-41000 Zagreb, Kroatio; tel. +385/(0)1/576-092; fakso 433-407.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Danny ten Haaf, Clarensteeg 2 G, NL-2312 WJ Leiden, Nederlando; tel. kaj fakso +31/(0)71/148-801.

Esperanton sufokas tro multaj iluzioj

De la 20-a de novembro ĝis la 18-a de decembro 1994 Antonio Valén pasigis kvar semajnojn en Karakaso (Venezuelo) gaste ĉe Fernando de Diego por helpi lin pri la *Granda vortaro hispana-Esperanta*, kies vorton "fino" li metis post pli ol kvar jaroj da laborego. Valén profitis sian restadon por intervjui de Diego, kiu fariĝis 75-jara la pasintan 2-an de novembro.

Kiam kaj kiel vi esperantistiĝis?

Mi ekstudis Esperanton proksimume en 1934, kiam mi estis apenaŭ 14-jara mezlernejano en Zaragozo, Hispanio. Tiutempe mia plej aĝa frato interesiĝis pri la internacia lingvo, kaj mi kun miaj ceteraj kvar fratoj sekvis liajn paŝojn. Ni ĉiuj lernis la lingvon.

Kiujn Esperantajn verkojn kaj aŭtorojn vi plej ŝatas? Kial?

Ne facilas starigi kategoriojn ĉi-rilate. Foj-foje lingve brilaj verkoj lamas pro manko de literatura valoro, sed meritas konsideron pro sia kontribuo al la plinuanciĝo kaj pliriĉiĝo de Esperanto. Kompreneble, modelaj verkoj devas esti lingve kaj literature elstaraj, sed same kompreneble, ili tre pokas. Laŭ mia percepto, Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien tronas senrivale en nia Elizeo, kaj nur plenmaneto da aŭtoroj sidas ĉe ilia dekstra flanko.

Tra la tradukoj

Kiujn kriteriojn vi sekvis por esperantigi ĝuste la verkojn kiujn vi elhispanigis? Kial vi tradukis en Esperanton ankaŭ el la galega, la angla kaj la franca?

Principe mi tradukas verkojn kiuj, unue, havas literaturan valoron, due, plaĉas al mi en la originalo, kaj trie, montras aspektojn iel defiajn al la traduka kapablo de Esperanto. Mi tradukis laŭmende nur du titolojn: *Viveroj* por komplezi galegajn samideanojn, kaj *Drolaj rakontoj*, el la franca, laŭ sugesto de Reinhard Haupenthal. El la angla kaj la franca mi tradukis ankaŭ eble pro ia profesia emo.

Kia estas via sistemo traduki?

Profunda amo al la metio kaj senfina pacienco necesas, kiel bazaj premisoj, al ĉia tradukanto. Sen ili oni nur fuŝas la laboron, eĉ se oni havas naturan talenton por la traduka arto. Aliflanke, mi klopodas redoni en miajn versiojn la ritmojn de la originalo por konservi kiom eble ĝian stilon, kaj plej zorgas ke ĝi fluu klare kaj nature en nia lingvo. Cetere, ĉiu el miaj tradukoj suferas plurajn reviziojn ĝis fine mi trovas ilin bonaj por publikigo.

Vi havas la famon utiligi pli ol necese neologismojn kaj modismojn...

La plej granda parto de *miaj* neologismoj kuŝas sur la paĝoj de PIV jam de multaj jaroj. La neologismoj multiĝis kun la kresko kaj maturiĝo de Esperanto, kaj se ili ĉesus aperi, la lingvo mortus senrimede de anemio kaj ankilozo. Mia utiligo de neologismoj povas ŝajni troa al samideanoj kun nesolida lingvo-scio, tamen mi verkas ne por ili, sed



De dekstre: Fernando de Diego, lia frato Óscar de Diego, kaj Antonio Valén, la 15-an de decembro 1994 en Karakaso.

por esperantistoj kiuj profunde posedas Esperanton kaj amas nian beletron. Kaj estas amuze konstati ke kelkaj aŭtoroj kiuj kultivas sian popularecon per demagogaj atakoj kontraŭ la neologismoj kaj ties uzantoj, ne ŝparas en siaj verkoj la formojn kiujn ili kondamnas publike.

Kial vi ne verkas originalan beletron?

Mi povus, sed mi preferas redoni ion vere elstaran ol krei mez-kvalitan produkton. Mi konas miajn limigojn.

Lingvaj problemoj de Esperanto

Kio igis vin verki viajn du eseojn *Pri Esperanta tradukarto* [= PETA] kaj *Pri literatura kritiko* [= PLK]?

La konvinko ke Esperanton sufokas tro multaj iluzioj, mitoj kaj mistifikoj. Mi pretendis prezenti la alian flankon de la medalo kia mi ĝin vidas. Ĉu la eseoj iel efikis aŭ ne, mi ne scias. Ŝajne la homoj ne ŝatas elrutiniĝi.

Kiuteman eseon vi ŝatus ankoraŭ verki?


(ridas) Ion pri la bagateleco de multaj eseoj kaj la eseindeco de multaj bagatejoj.

Vi diris ke "la tradukisto de nacia lingvo . . . disponas abundon de vortaroj, de referencaj verkoj . . . La tradukisto de Esperanto havas nur la *Plenan Ilustritan Vortaron* kaj la *Esperantan Proverbaron*" (PETA, p. 15). Tiu frazo datiĝas de 1979. Ĉu dume la libro-listo pligrandiĝis?

* Pri la afero vortara, mi kredas ke oni ekiras sur la bona vojo. Menciindas *Esperanta bildvortaro* de Eichholz kaj *Internacia komerca-ekonomika vortaro* de Munniksma. Iom post iom aperas pli bonaj nacilingvaj-Esperantaj vortaroj. Mi atendas kun granda intereso la eldonon de la itala-Esperanta vortaro de Minnaja kaj La Colla, kiu ŝajnas multe pli solida kaj serioza ol la desaponta franca-Esperanta de Le Puil kaj Danvy. Futura laboro por la Akademio povus esti la unuformigo de ĉi-specaj vortaroj rilate al signifoj kaj subsignifoj de kapvortoj, al frazeologio kaj al neologismoj.

"Same kiel en la naciaj lingvoj kunvivas komuniza terminaro por la amasoj, kaj fakvortaroj por aŭtoroj kaj sciencaj specialistoj, tiel same devas okazi en Esperanto, se oni volas respekti la normalan disvolviĝon de la lingvo" (PETA, p. 49). Ĉu tamen estas limigoj aŭ diferencoj inter la naciaj lingvoj kaj Esperanto?

Se Esperanto ne funkcius kiel la naciaj lingvoj, niaj ŝancoj de supervivado nehelpeble reduktiĝus. Ĉefa afero estas ke la uzantoj de nur bazaj vortaroj ne arogu al si la rajton teni en katenoj la lingvon pro ia erara koncepto fundamentista.



Tradukoj kaj aliaj verkoj de Fernando de Diego

La originan lingvon de la tradukoj ni notis nur kiam temas ne pri la hispana. La titoloj kun () ne (plu) estas haveblaj ĉe la Libroservo de UEA.*

La lando de Alvargonzález. Antonio Machado. Zaragoza: HEF, 1969. 47p. Romanco. "Machado transfiguris en artan gemon la banalan rakonton de kruda murdo." 5,40 gld.

Cigana romancaro. Federico García Lorca. La Laguna: J. Régulo, 1971. 110p. Verko pure hispana, sed universale aklimata. 9,00 gld.

Kun sopira koro.* Gustavo Adolfo Bécquer. Zaragoza: HEF, 1972. 93p. Poemvolumo de hispana poeto romantika.

La arbo de la sciado. Pío Baroja. La Laguna: J. Régulo, 1973 (2-a bindo, Roterdamo: UEA, 1989). 222p. Filozofia romano pri la sopiro al homa perfektigo. 24,00 gld.

Doña Bárbara. Rómulo Gallegos. Caracas: VEA, 1975. 264p. Unu el la plej famaj romanoj de la latin-amerika literaturo. 16,20 gld.

La ingēniera hidalgo Don Quijote de la Mancha. Miguel de Cervantes. Zaragoza: Fundación Esperanto, 1977. 820p. Gravuraĵoj de G. Doré. Bind. Ĉefverko, eble la plej bona romano de la monda literaturo. 93,60 gld.

Pri Esperanta tradukarto.* Saarbrücken: Iltis, 1979. 71p.

Boule de Suif.* Guy de Maupassant. El la franca. Saarbrücken: Iltis, 1982. 59p. Unu el la plej famaj noveloj de la aŭtoro.

Nuevo método de Esperanto para clases

y autodidactas. Madrid: Heroldo de Esperanto, 1982 kaj 1992 (2-a eld.), 215p. Moderna lernolibro por hispanlingvanoj. 18,60 gld.

Krado-mondo. Encarnación Ferré. Saarbrücken: Iltis, 1983. 144p. Romano pri la psiko de virino en malliberejo. 45,00 gld.

Viveroj. Alfonso Rodríguez Castelao. El la galega. Santiago de Compostela, 1983. 41p. Kvin rakontoj el 1934. 3,60 gld.

Pri literatura kritiko.* Saarbrücken: Iltis, 1984. 70p.

La degenero de William Auld. Recenzo pri Montara Vilaĝo.* Saarbrücken: Iltis, 1985. 11p.

D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde. Robert L. Stevenson. El la angla. Chapecó: Fonto, 1985. 96p. Fantazia romaneto pri apartigo de la morala kaj malmorala flankoj de unu homo. 10,50 gld.

La familio de Pascual Duarte. Camilo José Cela. Barcelono: Barcelona E-Centro, 1985. 167p. Romano pri homaj instinktoj kaj pasioj, de Nobel-premiita hispana verkisto. 22,50 gld.

Bibliografio de la publikaĵoj de Reinhard Haupenthal. Suplemento 1980-1986. Saarbrücken: Iltis, 1986. 12p. 3,90 gld.

Ankoraŭ pri la degenero de William Auld. Pri recenzo kaj ties sekvoj.* Saarbrücken: Iltis, 1987. 12p.

Astura bukedo. (Kun Jorge Camacho kaj Liven Dek). Gijón: Astura E-Asocio, 1987.

138p. Prozo kaj poezio de asturiaj aŭtoroj. 18,00 gld.

Naturalismo kaj skemismo. Korespondo inter Fernando de Diego kaj Karolo Piĉ.* Saarbrücken: Iltis, 1987. 76p.

Sentempa simfonio. Poem-antologio hispana. Madrid: Ed. la Misma, 1987. 154p. 18,00 gld.

Norda odiseado kaj aliaj rakontoj. Jack London. El la angla. Chapecó: Fonto, 1988. 112p. Noveloj pri la "barbare nobla" lukto kontraŭ la sovaĝa naturo de norda Ameriko. 16,80 gld.

Drolaj rakontoj. Honoré de Balzac. El la franca. Saarbrücken: Iltis, 1989. 106p. Eroj de iaspeca franca Dekameronono. 37,20 gld.

Cent jaroj da soleco. Gabriel García Márquez. Chapecó: Fonto, 1992. 372p. Bind. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 27. La pinta verko de la Nobel-premiita kolumbia aŭtoro: historio de la familio Buendía kaj de la vilaĝo Macondo. 57,60 gld.

La malica komizo. Wenceslao Fernández-Flórez. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 165p. Bind. Humura romano kies intrigon fonas la ekonomia krizo de la 30-aj jaroj. 15,00 gld.

Tirano Banderas. Ramón del Valle-Inclán. Madrid: HEF, 1993. 247p. Groteska romano pri amerika diktatoro, aŭguranta la latin-amerikan magian realismon. 18,00 gld.

Fernando de Diego (maldekstre) kaj Antonio Valén "gape" tostas je la manuskripta pretiĝo de grandega vortaro hispana- Esperanta.

La Esperanta literaturo

Kion vi opinias pri la nuna stato de nia originala beletro?

Ĝi ne signifas ŝanĝiĝis en la lastaj dek jaroj. Ne okazis subitaj aperoj de solidaj skoloj, kiel la Budapeŝta kaj la skota, kvankam la t.n. "ibera skolo" montras signojn de konkretiĝo. Rilate al la beletraj revuoj, mi pensas ke apenaŭ unu-du sukcesas elteni komparon kun la iamaj *Literatura Mondo*, *La Nica Literatura Revuo* kaj *Norda Prismo*. Pri la poemoj kaj noveloj, multaj aŭtoroj sekvas la jam malnoviĝintan modon verki kriptaj kaj esotere pri io nebule konfuza, kio metas la kompatindan leganton antaŭ la dilemo ĉu li troviĝas antaŭ geniaĵo aŭ, pli probable, antaŭ blago kaj mistifiko.

Laŭ vi "eĉ ne unu sola verko de serioza kritiko literatura ekzistas pri niaj originaloj kaj tradukoj" (PLK, p. 15). Ĉu vi rimarkis ian evoluon ĉi-rilate?

Ĝenerale la recenzoj estas veinde supraĵaj kaj ofte rivelas ne la rangon de la recenzata verko, sed la mankojn aŭ la senkaŝan partianecon de la recenzanto. Kiel antaŭ dek jaroj, plu mankas serioza kritiko beletra.

Naturalismo kaj neologismoj

Vi skribis ke "Esperanto hezitas inter du tendencoj... kio donas al ĝi ian provizorecon, ian mankon de baza solido. Temas pri ĝia duobla vizaĝo analiza kaj sinteza, aŭ, se vi volas, naturalisma kaj skemeca" (PETA, p. 17). Kvankam vi tuj aldonas ke Esperanto ŝajne iras definitive sur la vojon de la naturalismo, ĉu vi ne koncedus ke la nuna Esperanto rezultas el la mikso de ambaŭ tendencoj? Ke naturalismo superas skemismon en la literatura lingvo, dum en la parola lingvo estas inverse?

Ŝajnas al mi ke la naturalisma inklino de la lingvo pli akcentiĝis, malgraŭ la protestoj de kelkaj nostalgiuloj kaj teoriemuloj. Tio ke en kelkaj junulaj rondoj oni foj-foje elforĝas nombron da amuzaj kunmetaĵoj, ne donas sufiĉan bazon por aserti ke en la parola lingvo skemismo superas naturalismon: en la parola lingvo uziĝas ĉefe kliŝiĝintaj vortoj, sed ne novaj aglutinaĵoj.

Vi asertas ke "per skemeco... oni atingas diversajn manierojn esprimi la saman ideon, sed apenaŭ 'novan' ideon. La skemeco donas, ne leksikologian riĉon, sed stilistikajn variantojn" (*Naturalismo kaj skemismo*, p. 14-15). Ĉu vi ne opinias ke neologismoj ofte rolas same nur kiel stilaj variantoj?

Mi ne povas ne respondi jese vian demandon. Tamen tiaj neologismoj elpuŝas iom post iom la sintezajn formojn en

la kategorion de arkaismoj. Kiu uzus nuntempe "malgrandegulo" anstataŭ "nano", aŭ "mallaborema" anstataŭ "pigra"? La ĉefa afero estas ke la aglutineco ofte ne povas roli kiel taŭga difinilo. Ĉu ni uzu, laŭ recepto de Grosjean-Maupin, "mon-eldevigo per skandal-minaco" anstataŭ "ĉantaĝo", aŭ "noktelimalpermeso", prezentitan de Le Puil kaj Danvy enties *Grand dictionnaire français-espéranto*, anstataŭ la proponatan "kurfo"?

Vortaroj

Laŭ via PETA (p. 39), "nia ĉefa neceso, de la traduka vidpunkto, kuŝas, ne tiel en la Esperantaj-naciaj vortaroj, kiel en la naciaj-Esperantaj. Kio ĝis nun eldoniĝis ĉi-rilate ne kontentigas la minimuman bezonon". Ĉu tial vi entreprenis nun la verkadon de la *Granda vortaro hispana-Esperanta*?

La preskaŭ senescepte mizera nivelo de la nacilingvaj Esperantaj vortaroj ŝajnis al mi unu el la ĉefaj feblaĵoj de nia leksikografio. Dum multaj jaroj turniĝis senĉese en mia kapo la ideo entrepreni la kompilon de vasta vortaro hispana-Esperanta, kiu povus digne teni komparon kun la modernaj hispana-franca kaj hispana-angla de Ramón García-Pelayo, kies proksimume 60 000 kap-vortoj entenas preskaŭ la tutan frazeologion de la hispana. Post longa hezitado, mi ĵetis min en la aventuron, kaj nun, ĉe la fino de kvar jaroj, unu monato kaj kvar tagoj de senĉesa laborado, mi sukcesis kroni la taskon, dank' al la valorega helpo de miaj fratoj Óscar kaj Octavio, kaj al la efika kunlaboro de elstaraj esperantistoj hispanaj, kies nomoj koniĝos siatempe. La tuta vortarego estas jam komputile registrita, kaj ni uzos ankoraŭ proksimume unu plian jaron por la kompletigo de skrupula reviziado senca kaj teknika. Pri la financado de tiel giganta verko, nur Dio scias.

Laboro kaj plezuro

Kie fontas via eksterordinara labor-kapablo?

La sekreto de tio kion vi nomas "eksterordinara labor-kapablo" estas ke por mi la pri-Esperanta laboro konsistas fakte el plezuro. Kaj kiu ne ŝatas plezurigi al si la vivon?

Ĉu ĉe vi kuŝas neeldonitaj manuskriptoj?

Mi ne havas manuskriptojn. Ĉion kion mi verkis, oni eldonis. Kaj ni vidos ĉu okazos same pri la vortarego.

Ĉu vi opinias ke via laboro en Esperantujo iel, ial influis aliajn verkistojn?

Ne estas facile determini ĉu aŭ kiom miaj verkoj influis aliajn aŭtorojn. Ŝajne, kelkaj membroj de la t.n. "ibera skolo" rekonas tian influon. Se jes, mi ne povas ne senti min fiera ke mi iel stimulis ilian kreaĵon.

Kion Esperanto signifis por vi dum 60 jaroj da esperantista vivo? Kio katenis vin al la lingvo?

Kiam mi estis tre juna knabo, min pli altiris la esperantismo ol Esperanto. En tiuj jaroj mi inklinis en mia naiveco al anarkiismaj ideoj kaj pensis ke esperantismo povus esti alia instrumento de pozitiva socia ŝanĝo. Iom poste, la lecionoj de la reala vivo sobriĝis mian knaban idealismon, kaj mi konsideris nur la ege praktikan valoron de la lingvo kaj sentis min ravita de ĝiaj geniaj strukturoj. Se mi estis katenita al Esperanto, mi tute ne sentas la pezon de la katenoj. ★

Red.: La kompleta intervjuo aperos en Fonto.

Kiu zorgas pri Ameriko?

En februaro (p. 26) Philippe Chavignon urĝis al pli forta kunordigo en la amerika agado de UEA. Komentas la koncerna UEA-komisiito, la argentina Atilio Orellana Rojas.

UEA havas estraranon por azia agado (So Gilsu), unupersonan institucion por Afriko (Hans Bakker) ... Kiu zorgas pri Ameriko?

De multaj jaroj oni parolas pri la bezono havi tian homon, precipe por Sud-Ameriko. Tial en Seulo kreĝis kunordiga komisiono: Eduardo Bachrich (Venezuelo), Héctor Jiménez (Kubo), Symilde Schenk Ledon (Brazilo), Leonora Torres (Meksiko) kaj mi, la gvidanto. De tiam ni abunde kontaktiĝas inter ni kaj kun aliaj. En Tampere ni starigos budon kaj kunvenos por taksii la evoluon de nia agado.

Iam ekzistis planoj pri tut-amerikaj kongresoj, pri amerika revuo ...

Fakte, okazis iam Unua Latin-amerika kaj Dua Tut-amerika Kongresoj (Marília, Brazilo, 1978, resp. San Luis, Argentino, 1980). Lastatempe kostarikaj gejunuloj provis organizi tian kongreson en 1994, kun subteno de universitato, sed nur du landoj reagis al ilia invito! Eble en januaro 1996 la plano tamen realiĝos.

La ideo de propra revuo ĉiam ŝvebis en la aero, sed ne aperis redaktoro.

Ĉu la informoj bone fluas almenaŭ interne de la landoj?

Abundas lokaj informiloj, precipe en Brazilo, sed ne ĉiam oni scias sude kio okazas norde ...

Kio venigas amerikanojn al E-o?

Instigas ilin la deziro kontakti ekster-amerikanojn, neatingeblajn per la "komuna" hispana lingvo. En Brazilo speciale influas spiritismo, laŭ kies kredo en la mondo de la spiritoj oni parolas Esperanton. La entuziasmo estas granda: pasintjare, kiam mi instruis en Brazilo, aperis 220 personoj, malgraŭ preskaŭa neanoncado de la kurso!

Vi ĵus revenis el Afriko. Ĉu la movada rilato de Afriko al "Ne-Afriko" malsamas ol la rilato de Ameriko al "Ne-Ameriko"?

Por afrikanoj "Ekster-Afrikujo" ŝajne signifas nur Eŭropon. Tio kreas ian patro-filan, dependecan rilaton inter Eŭropo kaj Afriko. En Ameriko ni multe kontaktiĝas inter ni — kaj sendube,

ankaŭ kun Eŭropo, sed ne pro tio ke ni petus ian helpon: simple ĉar tie estas multaj e-istoj, libroj, leteramikoj ... Mi pli ŝatas tian nedependan sintenon.

Kion pri la movada rilato inter Latin-Ameriko kaj Nord-Ameriko?

Ĝi preskaŭ ne ekzistas. Usonanoj pli interesiĝas pri aliaj kontinentoj. Ĉi-jare, kiam mi instruos en la someraj kursoj de San-Francisko, mi provos impulsi la rilatojn. Cetere, ankaŭ latin-amerikaj esperantistoj devas esti pli akceptemaj al usonanoj kaj kanadanoj.

Fine, ĉu vi parolus iom pri la unuopaj landaj movadoj?

Nur pri kelkaj, kompletige al la lastatempaj informoj aperintaj en *Esperanto*.

Kostariko: Antonio Leoni de León kaj aliaj junaj aktivuloj venis al UK-oj, studis en San-Francisko, volontulis ĉe la Centra Oficejo. Ilia revuo *Ĉizilo*

devus ekaperi ĉi-jare. Ili intencas kunigi la agadon en Centra Ameriko.

Kubo: Kvankam ili vaste anoncas diversajn aranĝojn, preskaŭ neniu eksterlandano vojaĝas tien. En novembro mi iros al Kubo por kongreso de amerikaj homeopatoj, kiuj en 1993 decidis uzi Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj.

En pluraj landoj, ekz. *Venezuelo* kaj *Bolivio*, la movadon animas unuavice eksterlandanoj — malgraŭ ke, principe, bolivianoj povus forte interesiĝi, ĉar pro la kunekzisto de la hispana kaj de indianaj lingvoj ili konas la lingvan problemon.

Samo validas pri *Paragvajo*, sed tie e-istoj tute mankas pro la antaŭa diktatora reĝimo de Stroessner. Mi prelegis en 1991 en la ĉefurbo Asunciono, sed ŝajne sen efiko. Ne sufiĉas resti kelkajn semajnojn, eĉ monatojn, en iu lando; necesas surloka homo.

Argentino: Ĝojigas la novaĵo ke la du landaj asocioj, Argentina E-Asocio kaj E-Ligo ek-kunlaboras kaj baldaŭ eĉ traktos pri unuiĝo. ★



UEA-membro prof. José Dolores Gaitán (Batahola Norte Casa 1005, de Gallo y Villa Sur 1 cuadra al lago y 1,5 abajo, Managua, Nikaragvo), senlaborulo, instruas senpage brajlon kaj — parte al blinduloj — muzikon. (Surbilde: unu el liaj klasoj.) Dank' al la porblindula "Agado E3" de Jacques Tuinder (Nederlando), la lernejo ricevis en 1988 kelkajn bastonojn kaj monon sufiĉan por akiri uzitan aŭtobuseton. Nun ili ŝatus aĉeti kelkajn muzikilojn kaj ripari la buseton. S-ano Gaitán atendas ne tiom mondonacojn kiom ideojn kaj proponojn pri enspeziga kunlaboro.

Kolombio: La ŝarĝo de espero

La amerika movado ŝajnas aparte vigli kaj boli nuntempe en Kolombio. Ĵus, en februaro, ni parolis pri tiu lando (p. 26 kaj 39), sed jam atingis nin raportoj pluaj.

Kial mi decidis restadi tri monatojn en Kolombio? Pro eksterordinara homo kies konoj estas preskaŭ senlimaj, kvankam li estas kamparano kiu neniam eliris el Kolombio. Kiam mi aludis E-on, li tuj permesis al mi prelegi antaŭ liaj sekvantoj. Majstro de Tao-komunumo, li instigis siajn sekvantojn, pli kaj pli multnombrajn en Suda Ameriko, lerni E-on. Tre certe tiu movado grave rolos pri la disvastigo de E-o en Latin-Ameriko.

Alia ege favora faktoro en Kolombio estas la apogo de Luis Jorge Santos Morales, prezidanto de Kolombia E-Ligo, verkinto de altkvalitaj aŭdvidaj lerniloj (feb., p. 39). Li posedas plurajn institutojn pri instruado de la angla lingvo en la ĉefaj kolombiaj urboj. La ĉeesto de Esperanto ĉe tiuj institutoj havigas al ĝi famon de seriozeco kaj profesieco antaŭ la publiko kaj la komunikiloj.

En la ĉefurbo Bogoto, krom s-ino Leonor Calvo (vd. jul-aŭg., p. 121), viglas Santiago Álvarez propagande, instruade, kaj kunordigante naciskale la movadon, kiu ankoraŭ ne estas bone strukturita, sed floras en pluraj urboj.

Pro la impulso el diversaj flankoj, la estonteco de la movado en Kolombio

instigas al optimismo. Kial eĉ ne kalkuli pri Kolombio kiel kandidato por organizi UK-on antaŭ la tria jarmilo?

Philippe Chavignon (Francio)



Philippe Chavignon instruas Cseh-metode en kolombia Tao-komunumo.

Favore al la forgesitoj

Kiam nia grupo de esperantistoj iris en la flughavenon akcepti nian nekonatan svisan gaston, ni ne kredis renkonti iun eksterordinaran. Sed post la kutimaj bonvenigoj Marco Girolametti sciigis nin pri la motivo de sia veno: helpi nialandajn stratinfanojn eliri el la mizero, kun subteno de esperantistoj. Li restis ĉe ni kvin monatojn. Ĉiun tagon, senescepte, li agis favore

al la forgesitoj. Li ne permesis al si eĉ unu momenton por ripozi aŭ distriĝi. Malgraŭ malsaniĝo, li neniam perdis la esperon sukcesigi sian projekton. Li celis la “malfacilajn knabojn”, kaj la unuaj semoj ekĝermis, ĉar inter ili kaj li fariĝis laŭdinda harmonio.

Pluraj baroj kune obstaklas la fondon de Stratinfanejo. Sed Marco — kaj ni — firme kredas ke la afero venkos.

Nia grupo akceptis Marco-n kun estimo kaj adiaŭis lin kun amo. Kiam li marŝis al la aviadilo returne al Eŭropo, mi vidis ke, anstataŭ per sia modesta tornistro, li ŝarĝis sian dorson per la espero de centoj da ridetantaj etuloj.

Santiago Álvarez (Kolombio)

Red.: En venonta numero Marco Girolametti prezentos sian projekton.

Brazilo: Ĉu UK en 2001?

Dum la 30-a Brazila Kongreso de Esperanto en Natal (julio 1994) la ĝenerala asembleo de Brazila E-Ligo decidis daŭrigi la diskutojn en venonta eksterordinara kunsido.

Por tiu kunsido (6-8 jan.) alvojaĝis al la ĉefurbo Braziljo (kelkiuj el distanco de pli ol mil km-oj) la 14 membroj de la Federacia Konsilantaro (FK) kaj aliaj interesatoj, entute trideko da homoj el 11 brazilaj ŝtatoj.

En la unua tago ili vizitis terenon ĵus donacitan al BEL en Samambaia, je proks. 30 kilometroj de Braziljo. Laŭ la planoj, sur tiu 1080 m²-a, taŭge prikonstruebla terpeco starigos nacia sidejo de BEL ene de kvin jaroj.

En la inaŭguro la prezidanto de FK, Ivaldo Alves, entuziasmige prelegis pri

“Evoluo de E-movado en Braziljo: Nacia pakto por kunlaboro”. Laŭ lia analizo la movado devas vekigi pro la ŝanĝoj en la brazila socio, kiujn kaŭzas i.a. la disvolvigo de la komuna merkato Mercosur (“Sudmerkato”: Argentino, Braziljo, Paragvajo, Urugvajo).

FK aprobis la kreon de departementoj pri informado, instruado, junularo, kulturo kaj turismo. Kreiĝis ankaŭ komisionoj pri kongresoj,

pri interrilatoj kun asocioj, kaj pri amerika agado (respondekas Symilde Schenk Ledon). Starigis fondaĵo, zorge de Gilbert Ledon, por subteni la revigligon de la revuo *Brazila Esperantisto*.

Oni aprobis Strategian Planon por 1995, kiu celas vere tutnaciigi la organizaĵon. BEL ankaŭ planas inviti la Universalan Kongreson de Esperanto por la jaro 2001.

Laŭ PEA-Informilo, S. Schenk Ledon kaj Esperantopres’

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

ĈRI 30-jara

Cento da e-istoj kunvenis la 19-an de dec. en Pekino, por soleni la 30-jariĝon de E-disaŭdigoj ĉe Ĉina Radio Internacia.

ĈRI estas la sola ŝtata radio-stacio en Ĉinio kiu elsendas eksterlanden. Kvankam ĝiaj E-programoj disaŭdiĝas en relative malmultaj horoj, kaj E-o estas nur unu el ĝiaj 38 lingvoj, ĈRI tamen ĉampionas tutmonde inter la stacioj elsendantaj en E-o, ĉu laŭ la kvanto de disaŭdigaj horoj, ĉu laŭ la areo kovrata de ĝiaj "verdaĵ" radio-ondoj.

Prepare al sia jubileo, la E-sekcio organizis vojaĝon en pasinta sept. kun Internacia Kultura Laborejo (Tokio). USUI Ryoo (Japanio) publike dankas: "Jam pasis duona jaro post kiam ni kaj vi, kara Li Yuping, kapabla raportistino de ĈRI, demetis rozojn ĉe la tombo de Verda Majo kaj ŝia edzo, LIU Ren. Mi tre bone memoras vian kortuŝitan vizaĝ-silueton. LIU Junfang, mi dankas vin pro via akompano kaj interpretado. Vian bonkorecon mi ĉiam sopiras fore kiam mi aŭskultas vian voĉon el mia malgranda radio-aparato..." ★

Koreio: Kio post la UK?

Kvankam ne plene mallaciĝintaj, koreaj esperantistoj kolektiĝis tri monatojn post la UK por sia 26-a nacia E-kongreso (29-30 okt., Seulo). En 1995 ili alfrontas novajn defiojn.

Eble la elĉerpiĝo post la grandaj someraj eventoj malpliigis la partoprenantaron kompare kun pasintaj kongresoj, ĝis 169 homoj. Elektiĝis novaj prezidanto kaj vicprezidantoj: LEE Chong-Yeong, resp. Puramo Chong, RHEE Hak-sun kaj CHUNG Hwan-gun (aŭtoro de la libro *Nova mondo. Principoj por homa vivo kaj paco*, distribuita en la UK). Merito-tabulon ricevis MA Young-tae, pro siaj sciencaj atingoj kaj aparte pro *Granda vortaro Esperanto-korea*, kaj BAK Hŭaĝong, pro la antaŭenigo de la movado en sia regiono.

"La korea E-movado devas de nun finance tute memstari" — avertis LEE Chong-Yeong en unu el la lastaj numeroj de *La Espero el Koreio*. Jes, vere lastaj, ĉar la korea registaro ne plu subtenas finance la eldonon de la 5000-ekzemplera revuo, kies n-ro 123 (nov.-dec. 1994, 19-a jaro) fariĝis do la adiaŭa numero. Ekde 1995 anstataŭas ĝin *La Lanterno Azia* (vd.

dekstre, supre), ĝis nun interna organo de Korea E-Asocio, kiun redaktas CHOE Tae-sok, pli frue redaktoro (1989-1993) de *La Espero el Koreio*. (El *La Espero* kaj *La Lanterno* ni ĉerpis la materialon de ĉi tiu artikolo.)

La E-klubanoj de universitato Dankook, en kiu Esperanto estas elektelebla dua fremda lingvo de multaj jaroj, ĉiujare prezentas E-teatraĵon. Pasintjare ili surscenigis, la 1-an de oktobro, la verkon de CHŌN Okchu, *Sunvitroj de maljunuloj* (tr. BAK Giŭan). Samloke, kvindekda homoj finis elementan E-kurson de KEA (5 okt. - 4 nov.). 14 el ili poste eklernis en progresiga kurso de MA Young-tae, en ĉambro de nove inaŭgurita Esperanto-domo. Temas pri parto de eldoneja oficejo, kiun CHUNG Hwan-gun disponigis al la movado.

La 15-an de oktobro fondkunsidis Seula Klubo de Esperanto (CPO Kesto 3047, Seulo 100-630), kiu ŝatus ĝemeliĝi kun kluboj el diversaj mondpartoj.

Japanio: Transjare, transmare



Nove perata de UEA
La Lanterno Azia
 (organo de Korea E-Asocio)
 Po duono en Esperanto
 kaj la korea.
 45 gld. por 11 n-roj jare.
 Anstataŭas kaj daŭrigas
La Espero el Koreio.

En SKE plejparte membras tre spertaj koreaj e-istoj, ekz. sekretario BAK Giŭan. La klubo celas plialtigi la kvaliton de la korea E-movado kaj informadi la laikan publikon.

La konata korea lingvisto LEE Hyun-bok prelegis novembre en la 23-a Internacia Konferenco pri Monda Paco en Tokio. Li diris ke unu el la kondiĉoj por realigi "eraon de Orienta Azio" estas la ekuzo de Esperanto kiel azia interlingvo. LEE Hyun-bok konatiĝis kun Esperanto en 1955, kaj la Seula UK instigis lin rilati al ĝi pli proksime.

En januaro kaj februaro tri multe legataj taggazetoj, *Chung-ang*, *Chosun* kaj *Hankuk*, pritraktis E-rilatajn temojn: *Chung-ang* ekz. raportis ke plimultiĝas dommastrinoj lernantaj Esperanton. ★

Papero kaj kapsiko

La japana-korea "Esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio" avangardas pritraktante la daŭre tiklajn rilatojn de siaj du landoj. Iniciatinto Nisio Tutomu klarigas kiel.

Papero, kiel tekniko kaj aĵo, estis enportita tra Koreio al Japanio; kapsiko, de Japanio al Koreio. Ili simbolas la densajn rilatojn de la du landoj. Nia agado nomiĝas do "Papero kaj kapsiko".

Nia grupo celas verki facilan historion pri la propra lando de la grupanoj, pri ties rilatoj kun aliaj landoj, kaj — en fora estonteco — pri la mondo, per kunlaboro de e-istoj diverslandaj. Kiel unua eta paŝo, ni komencis pri la rilato-historio de Koreio kaj Japanio.

Ni esperantigis la libron *Enkonduko: Historio de Koreio kaj Japanio* de KUBOI Norio, kiu, renkontante nin la 29-an de aŭg., donis permeson pri la traduko. Ni planas eldoni la verkon ĝis la ĉi-jara Komuna Seminario de koreaj, japanaj kaj (unufoje) ĉinaj esperantistoj.

Jen fragmento el la libro:
 "Jam estas konate ke la atombomboj de la usona armeo viktimitis 440 mil homojn en Hiroŝimo kaj 300 mil

en Nagasako en aŭgusto 1945. Inter tiuj atombombitoj estis 50 mil koreoj en Hiroŝimo kaj 20 mil en Nagasako. (...) El la 70 mil koreaj atombombitoj 40 mil mortis. El la postvivintoj 23 mil repatrujiĝis, kaj 7 mil restis en Japanio. La lastaj havas rajton ricevi aplikon de la leĝoj por atombombitoj. (...) [Sed] la japana registaro tute ne respondicis al koreaj atombombitoj repatrujiĝintaj. (...) En 1978 por la unua fojo korea atombombito, SON Ĝin-du, sukcesis gajni 'san-kajeron pri atombombito' kaj 'agnoskon pri atombombito' [necesaĵoj por ŝtatokosta kuracado], kaj en 1980 komenciĝis kuracado al koreaj atombombitoj. La kuracado tamen finiĝis en novembro 1987. La japana registaro ankoraŭ plu devas sincere respondi al la korea kaj ĉina popoloj suferintaj dum la agres-milito."

Interesatoj kontaktu:

Tutomu Nisio (Takadono 4-13-3, Asahi-ku, Oosaka-si, 546 Japanio)

Signoj de azia solidaro

La plej granda kontinento de la mondo, Azio, estas la dua plej granda kontinento de Esperantujo. Ĝuste pro ĝia grandeco, nepras zorga kunordigo en la azia agado.

Pro tiu neceso, en la Seula UK elektis Komitato pri Azia E-movado (KAEM), en kiu membras TAKEUTI Yosikazu (ĉefkomitatano), SYOZI Keiko (ambaŭ Japanio), Puramo Chong (sekretario), LEE Jung-Kee (ambaŭ Koreio) kaj ZOU Guoxiang (Ĉinio). La plej grava decido de KAEM estas ke ekde 1996 okazu, probable en ĉiu dua jaro, Aziaj Kongresoj. La unua Azia Kongreso, kvartaga, estas antaŭvidata por majo 1996, en Ŝanhajo.

La signoj de movada solidareco en Azio estas multnombraj — kaj eĉ kvan-tigeblaj. Pasintjare 166 esperantistoj kaj E-grupoj japanaj kontribuis al la realigo de Azia Karavano, donacante sume 1 935 000 enojn (ĉ. 34 mil gld.).

Temis pri vojaĝ-subvencio al Seulo, el kiu profitis naŭ aziaj e-istoj: CHHIM

Sokha (Kamboĝo), Ĉimidijn Dogsuren (Mongolio), LIU Xiaojun (Ĉinio), Vladimir Minin (Rusio), Gafurĵan Mirzabajev (Uzbekio), NGÔ Châm Lý (Vjetnamio), Mukunda Raj Pathik (Nepalo), Sundresh Pradhan (Bharato) kaj YU Dequan (Ĉinio). Aliaj ok invitaj "karavananoj" ne povis veni pro vizo-manko aŭ aliaj kaŭzoj; aliflanke, surloke aldoniĝis Razen Manandhar (Nepalo) kaj Hamzeh Shafiee (Irano).

Post la UK, la subvenciitoj restis en Koreio por kolekti pluajn movadajn spertojn. Por Japanio nur Chhim, Dogsuren, Mirzabajev, kaj Pathik ricevis vizon: ili do po duope prelegvojaĝis al 26 japanaj urboj inter la 13-a kaj 30-a de aŭgusto. En naŭ lokoj ĉeestis ankaŭ ekstermovada publiko. ★

Ekde 1989 ĉiam transmariĝas koreoj por partopreni la tradician Transjaran Kurskunvenon de Esperanto, kiun organizas la Junulara Fako kaj Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto en Kameoka. En februaro (p. 27) ni jam raportis pri la lasta Kunveno (30 decembro - 2 januaro). Jen foto de la ĉeestantoj.



Slovakio: Unu fino, unu komenco

Dum la pasinta jaro pezaj nuboŝtormoj ariĝis super Slovakia E-Asocio, pro la akumuligintaj ŝuldoj de ĝia E-centro en Poprad. Fakte, fine de 1994 la asocio devis malfondiĝi. Kiel do marŝos plu la movado en Slovakio?

“La fino de la Asocio ne signifas finon de la E-movado en Slovakio” — emfazas Augustín Čambál, prezidinto de SEA, en la iama SEA-organo *Esperantisto Slovaka*, el kiu ni ĉerpis la informojn kaj eĉ la titolon por ĉi tiu artikolo. ES nun plu aperas kiel “gazeto de E-movado en Slovakio”, parto de la revuo *La Dua Jarcento* (vd. p. 71).

La 13-an de novembro 1994 la Asocia Konsilantaro de SEA decidis ĉiuvoĉe (kun unu sindeteno) malfondi la asocion je la 31-a de decembro. Origine SEA ja esperis ke ĝi povos kovri siajn ŝuldojn vendante la du domojn de la Poprada centro, sed tio montriĝis neebla pro “neatenditaj obstrukcoj de la loka ŝtata organo en Poprad”. Tial ne restis alia solvo ol likvidi la asocion.



Poprad: la E-centro kiu pereigis landan asocion

Tamen, la SEA-konsilantaro “dum sia lasta kunsido en decembro 1994 kreis finanĉan eblon por konservo de la ĝisnunaj ejoj en Bratislavo kiel antaŭkondiĉon por ekesto de . . . nova supera organizo, supozeble, E-Unio de Slovakio”. Organizan skizon por tiu venonta, malcentrismo EUS proponis Stanislav

Košecký: ĝia supera organo, elektita konsilio, rolus ĉefe kunordige inter la diversaj E-societoj (teritoriaj, profesiaj, hobiaj), plejparte jure memstaraj.

Jam en januaro 1995 ekestis Esperanta Societo '95 en Bratislavo. Laŭ la estro de ĝia preparkomitato, Ján Bujalka, ESO '95 antaŭvidas membrecon individuan, kolektivan kaj aligitan (subtenan) — ankaŭ por eksterlandanoj — por transiri la regionecan karakteron. Baldaŭ okazos ĝia unua asembleo.

Kiel jure memstaraj organizoj, fondiĝis ankaŭ, jam en 1994, regiona societo en Poprad, E-klubo en Liptovský Mikuláš, Skolta E-Ligo Slovakia, kaj — en 1995 — la slovakia sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista. En aprilo verŝajne registriĝos mezslovakia regiona societo. ★

Informa ondo en Albanio

Albana Esperanto-Ligo festis sian kvaran datrevenon la 9-an de marto. Prepare al tio kaj por sentemigi la publikan opinion pri Esperanto, la aktivuloj de AEL intensigis sian informadan laboron.

Lastatempe pluraj radio-elsendoj transprenis novaĵojn de la E-societoj en Durrës (gvidas Luan Jaupi) kaj Kukës (estras Shaban Hasani), pri ties agado.

En decembro du sinsekvaj numeroj de la tutlanda instruista organo *Mësuesi* publikigis artikolon de Bardhyl Mezin pri la valoro, neceso kaj instruado de Esperanto. Simila teksto, emfazanta la aktualecon de Esperanto kiel lingvo por Eŭropa Unio, aperis en la ĵurnalo *Rilindja* (20 jan.), kiu jam publikigis (30 aŭg. 1994) longan tekston pri la aktivulo Zef Mjeda (vd. pri li *Esperanto*, majo 1993, p. 84), kaj tradukon de Bahri Peraj

el *Ŝanco por feliĉo* de Phil Bosmans (30 okt.). *Rilindja* estas legata de elmigrintaj kosovanoj en multaj landoj. Sekve, al la sekretario de AEL venadas leteroj kiuj petas helpon lerni Esperanton per koresponda kurso — kiu tuje estiĝis.

La 24-an de januaro Samir Beqiraj, estro de la nova organizo Albana Unuiĝo E-ista Junularo, kuniganta ĉefe mez- kaj altlernejanojn, intervjuiĝis rekte en matena televid-elsendo. La 18-an de februaro Vasil Pistoli kaj Bardhyl Mezin, prezidanto resp. estrarano de AEL, televide konversaciis, dum 30 minutoj, pri la agado de

AEL kaj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.

La koncerna televida redakcio pretas elsendi ĉiusemajnan E-lecionaron, en 10 x 30 minutoj, se AEL disponigas taŭgan materialon. *Mazi en Gondolando* estus bona elirpunkto por tiu celo. Ni alvokas la vastan samideanaron helpi nin pri tiu ĉi projekto.

Agim Peraj (Nr. 72, Shengjin, Lezhe) mem eldonas dumonatan E-lingvan revueton, *La Ponto*, pri albanaj historio, politiko, kulturo kaj nuntempa vivo.

Kolekto de 80 poŝt- kaj bildkartoj, adresitaj en 1925-1926 al la e-isto Vilhelm Koliqi (kiu vivas en Shkodër), restadas ĉe filatelejo en Tirano. Interesatoj povas ricevi kopiojn aŭ originalojn, laŭ interkonsento, de: ALB.FN SH.P.K., P.O. Box 132, Tirana.

Bardhyl Mezin
Estrarano de Albana E-Ligo

Reagoj



Pri movado

Ĉu praa = antikva = for?

Pri la interesa intervjuo kun D. Tarschys (jan., p. 2) du demandojn:

1. Kiu estas “ni” (la intervjuintoj)? Decas diri sian nomon, se oni ion diras.

2. El kiu fonto ĉerpis “ni” dirante: “Mi devas precizigi ke la *esperantistoj plejparte ne plu celas* ĝeneraligi la uzadon de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj”?

Temas ja pri nia praa celo, kaj subteni ĝin estas en iuj rondoj nomata “pracelismo”. Se oni ne multe parolas pri tiu celo eble malproksima, ĉar ĝi ja ne povas esti atingata per la farenda venonta paŝo, tio ja ne signifas ke ĝi ne plu validas. Unu afero estas ke mi ne konsentas, kaj pri tio oni povas ja bone diskuti; sed la dua estas ke mi trovas min per tiu “precizigo” en plia minoritato, kaj kie mi estas, tion scii kompreneble interesas min.

Vilhelmo Lutermano (Francio)

Red.: 1. “Ni” (*pluralo pro modestece*, PIV 4) signifas “la redakcio de Esperanto” ... *Eĉ se tiu redakcio konsistas el unu persono*, István Ertl.

2. Ni (*mi*) dubas ĉu ekzistas fidinda fonto (ekz. *taŭga sociologia esploro*) kiu povus subteni tiun aserton. Ni povas referenci nur al *personaj impresoj pri la movado*, eble malĝustaj.

Paradizo por verkemuloj

T. Sinno proponas (jan., p. 9) ke “libere fluu la informoj por ebligi kunordigadon”. Mi konsentas, kaj mi proponas ke ni utiligu la novaĵ-grupon “soc.culture.esperanto” de Internet, de kiu oni povas ricevi multajn diversajn informojn. Por tiuj kiuj estas verkemaj, ĝi estas paradizo, ĉar ĉiuj verkoj estas aperigataj.

UĈIDA Masatomo (Japanio)

Brave al Zofia!

Bonega kaj pripensinda la artikolo de Zofia Banet-Fornalowa pri la Montevidea Unesko-rezolucio kaj Ivo Lapenna (dec. '94, p. 204). Tre

malgrandan, se ian, evoluon ni konstatas en UEA post Lapenna. De jaroj, la membraro (kaj la E-parolantaro en la mondo) restas konstanta, dum la monda loĝantaro preskaŭ duobligis. La konkludo, do, estas ke Esperanto malkreskas.

Roberto Resende (Brazilo)

Pri la revuo

Ŝika, sed pli maljuna

Mi ĵus ricevis la ŝike vestitan Esperanto, kaj mi senprokraste esprimas al vi mian kontenton.

Tamen permesu al mi ne konsenti kun via diro pri la aĝo de la kara revuo. Ja ĝi estas ne 88-jara (jan., “Vi trovos”), sed 90-jara. La konfuzo jam datiĝas de 1946! Post trijara interrompo pro la milito (1943-45), la tiama redaktoro, Hans Jakob, notis per “39-a jaro” la januaran-februaran kajeron de 1946 (n-ro 493). La “38-a jaro” finiĝis per la kajero n-ro 492 de aprilo-junio 1942.

Se oni deziras dekalkuli la eldonan interrompon, oni ne parolu pri aĝo, sed pri jarkolektoj, ja 88.

Koncerne la aĝon, nia Esperanto jam festos sian 90-an naskiĝtagon en junio ĉi-jare.

Jean Amouroux (Francio)

Bonan revenon al la stelo!

Eĉ se diskrete tio okazas, helpe de inĝenia aranĝo en la majuskla litero A de ĝia frontpaĝa titolo, feliĉe la UEA-organon refoje ornamas, ekde ĝia januara numero nunajara, la de D-ro Zamenhof adoptita kvinpinta stelo, jam de pli ol cent jaroj tuta-monde konata kiel la simbolo de Esperanto.

Vicente Hernández Llusera (Katalunio)

Mi forigus la stelon

Mi kontentas (eĉ ĝojas) pri la nova “vesto” de via revuo: ĝi aspektas nun esence pli bele kaj moderne ol antaŭe. Tamen, mi forigus la stelon de la titolpaĝo: mia opinio oni tute ne uzu stelon kiel signon de Esperanto —

aŭ, se oni tamen nepre volas, oni uzu verdan stelon sur blanka fono.

Ulrich Matthias (Germanio)

Pri lingvo

Finnlando kaj Esperanto

De almenaŭ jardeko mi estas konscia pri la prononco de *Finnlando*, kaj en tiu periodo mi aŭdis la duoblan *n* ege malofte — kaj tiam nur de profesiaj lingvistoj. Tute klare, la homoj ĝenerale diras *Finlando*, kaj tiel ni atencas la naŭan regulon de la Fundamento (“ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita”). Mi hontus klarigi al komencanto ke *Finnlando* enhavas du *n*. Ĉu ni ne povus meti finon al tiu absurda literumo, antaŭ ol ĝi disvastiĝos ankaŭ al aliaj vortoj (ekz. *Esperanto*, por distingi ĝin de *Esperanto* — iu kiu esperas)?

Ian Fantom (Britio)

Pri cetero

Nobel' ≠ prestiĝ'

“Nu, se la ekonomika premio [kiun ricevis la e-isto Reinhard Selten] havas prestiĝon egalan kun tiu de la aliaj [Nobel-premioj], kial kontesti ĝian ‘Nobelecon’?” — demandas la revuo (feb., p. 29).

Simpla demando (kvankam PIV skribas egala *al*, sed ankaŭ *Esperanto*-redaktoro rajtas fojfoje dormeti). Jen du simplaj respondoj:

1. Ĉar tion faras la Nobel-fondaĵo. Ĝi emas zorge distingi inter *Nobel-premio* (la kvin premioj menciitaj en la testamento de Nobel, kaj pagataj de la Nobel-fondaĵo) kaj *premio memore al Nobel* (la ekonomika, sen ligoj al Alfred Nobel, kaj pagata de alia fonduso). Estas malbona ĵurnalistiko forviŝi tiun distingon.

2. Ĉar la familia nomo *Nobel* ne estas sinonimo de la Esperanta radiko *prestiĝ-*, kaj estas malbona lingvouzo ne distingi inter ili.

Gunnar Gällmo (Svedio)

La vunda loko

G. Kamaĉo (dec., p. 209), kun la rimarko pri la subteno de la itala Radikala Partio al Esperanto, pikas la vundan lokon. Fakte, ĉiam pli malfacilas aliĝi al la E-movado sen suferi la premon asociiĝi ankaŭ al iu branĉo de la Radikala Partio, kaj sen taksigi, inter konatoj, subtenanto de la politika radikala ideologio.

Armando Zecchin,

Luciano Mantaud (Italio)

Ni eliru el la kaŝejoj

Eŭropa Unio ĵus ekhavis du pliajn membrojn (Svedio kaj Finnlando), pro kio la oficialaj lingvoj atingis la nombron 11 kaj la "traduk-direktoj" do 110. Lige kun tio reaŭdiĝas proponoj por malpliigi la kvanton de la lingvoj uzataj en EU.

En Nederlando (kies lingvon oni volus forigi) aperis pro tio pluraj artikoloj. Interalie, en novembro 1994 duonpaĝa artikolo de la tutlanda ĵurnalo *De Volkskrant* priskribis la problemojn de multlingveco en la institucioj de EU, sed ĉefe avertis pri la danĝeroj kiujn proponoj por limigi la uzon de la "malgrandaj" lingvoj prezentas i.a. al entreprenoj en tialingvaj landoj. Sen ajna mencio pri ebla solvo. Interlingua-isto preskaŭ tuj reagis. Baldaŭ aperis, kune, sub granda titolo, du leteroj pri la preferindeco de Esperanto. Tio vekis alian reagon por E-o, sed ankaŭ po unu por Ido kaj latino...

Mi eksentis la bezonon *iom sisteme* informi la legantojn de iuj gravaj tutlandaj ĵurnaloj pri: la ekzisto de lingva problemo en la organoj de EU kaj inter la EU-civitanoj; la danĝeroj de ne-egala traktado de la lingvoj en EU;



La lingvaj problemoj de EU inspiras ankaŭ karikaturistojn. El *Tampere-lainen*, gazeto de nia kongresurbo: "Esperanto proponata kiel laborlingvo por EU". Kaj sube: "Ĉu necesas paroli Esperanton por esti dungita?"

la netaŭgeco de EU-proponoj pri deviga instruado de du fremdaj lingvoj; la tute malĝusta, troiga ĝenerala imago pri la kono de fremdaj lingvoj en Nederlando; kaj tio ke Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo povus prezenti solvon — kiun EU almenaŭ esploru.

Pli ampleksajn miajn artikolojn la redakcioj komence rifuzis. Do mi decidis provi per "leteroj al la redakcio". El tio rezultis presiĝo de sep miaj leteroj (ĉ. 200-vortaj) en tri tutlandaj ĵurnaloj, *De Volkskrant*, *Het Parool*, *Algemeen Dagblad*. Sed post tia pre-

paro de la grundo, aperis ankaŭ 600-vorta artikolo mia en *Het Parool*, plus (en *Algemeen Dagblad*) tre okulfrappe prezentita 500-vorta teksto de William Auld (traduko mia). Ses miaj provoj ne akceptiĝis; presiĝis naŭ el miaj leteroj kaj pluraj de aliaj esperantistoj. Ĉio tio en daŭro de tri monatoj.

Por mi tio signifas ke redakcioj ne estas malemaj publikigi argumentoriĉajn reagojn al specifaj artikoloj aŭ novaĵoj, kiel pri-lingvaj proponoj en EU, malfermo de ankoraŭ-pli-perfekta kurso por la angla, tutmonda televida disaŭdigo de fuŝparolanta gravulo, aviadila preskaŭ-akcidento pro miskompreno ktp.

Venis la tempo, almenaŭ en Eŭropa Unio, por ke E-parolantoj eliru el siaj kongresaj aŭ literaturaj kaŝejoj, kie ili komplete sekrete utiligas la lingvon nur por sia propra plezuro. Se ni vidas ke ekzistas lingva problemo, kaj se ni por ni mem konstatis ke E-o povas prezenti solvon por egalnivela, nediskriminacia kontakto inter homoj, ni ne tenu tiun eltrovaĵon sekreta!

Wouter F. Pilger['] (Nederlando)

Red.: Je redaktofino W.F. Pilger akiris internacian "trofeon": la usona Time (20 marto) aperigis lian leteron pri la uzo de la angla en Hinda Unio. ("... Esperanto-parolantoj dirus jene: 'La unua lingvo de iuj neniam povos esti la dua lingvo de ĉiuj.'" Samloke la saman temon komentas e-istino Marjet H. Erasmus-van Zadelhoff (Nederlando).


Kontraŭ kalumnioj

La ĉi-supra artikolo donas la impreson ke, almenaŭ en Eŭropo, la gazetaro nun pli ofte pritraktas la lingvan problemaron. Neeviteble, tio generas menciojn de Esperanto: ne ĉiam je nia iniciato, ne ĉiam pozitivajn.

En la oktobra monata suplemento de la prestiĝa svisa ĵurnalo *Neue Zürcher Zeitung* (NZZ) aperis tutpaĝa "Nekrologo de Esperanto" de Wolf Schneider, estro de ĵurnalista lernejo en Hamburgo. Laŭ li, pro la sukceso de la angla "neniam oni tiom [kiom nun] malbezonis artefaritajn lingvojn", kiujn do "oni devas deklari mortaj". Ne provante eĉ distingi inter ĉi tiuj, li nomas Esperanton "malbono/malfeliĉo/malsano" (*Übel*), kaj finas jene: "Pacon al viaj cindroj, Interlingua-oj kaj volapukoj; la lingvo ne estas tia."

La kunordiganto de la respond-kampanjo, Andy Künzli, avertis la redakcion ke la artikolo "ofendas internacian lingvokomunumon", kies respondeculoj "ne hezitus postuli riparacion". NZZ en novembro kaj decembro aperigis leterojn i.a. de Reinhard Haupenthal, Lucien Giloteaux kaj Arthur Baur. La reago de Haupenthal akiris jene: "La aserto de Schneider, ke Esperanto ne havas etoson kaj profundon, estas lingvistika Auschwitz-mensogo; temas ja pri misfamigo de lingvo (la unua ŝtupo al lingvomortigo) kaj de internacia (ankaŭ denaska) lingvokomunumo".

ie



Verko nepra por kulturlingvo

La respubliko. Platono. El la helena trad. Donald Broadribb. Matrville: Aŭstralia E-Asocio, 1993. 4+113p. 30cm. 30,60 gld.

Jen fama teksto en Esperanto-vestoj: *La respubliko* de Platono. Broŝurita eldonaĵo modesta, sed bone presita, zorge trakorektita, tre legebla, enpaĝigita po du kolumnoj sur 113 paĝoj A4-formataj. Ĝin tradukis kaj senpolvigis aŭstralia kolego: Donald Broadribb. Gratulon!

lingvaĵon. Multaj kaj bonaj piednotoj helpas la leganton kompreni kaj la malfacilaĵojn de la teksto kaj la inventaĵojn por esperantigi ilin.

Estis trafe rezigni pri traduko bi-jekcia* de ἡ δικαιοσύνη (*he dika-josine*): filozofistoj ja komprenos la tialon, kaj ceteraj legantoj ĝuos laŭ-

longaj kaj ŝajne harfendaj diskutadoj celas determinon de filozofiaj konceptoj. Sokrato provas klarigi kio estas, esence, la Justeco, la Moraleco, la Virto. La diskutadon ekflamigas provoka opinio de la sofisto Trasimaho, kiu volas redukti la moralecon je submetiĝo al senmoralaj regantoj. Sokrato kredas ke virta konduto estas en si mem bona. Li superdialektikas la argumentojn kontraŭdirecajn de Trasimaho, kaj volas haltigi la diskutadon. Adejmanto, Glaŭkono kaj aliaj ĉeestantoj petas tamen pluadon ĝis difino de la Justeco. Tiam Sokrato eliras el tre helena analogio inter civito kaj civitano: la justeco en la civito estas, makrokosme, kiel la moraleco en individuo, mikrokosme. Sufiĉas koni la Justecon en civito, por koni ankaŭ la moralecon en homa individuo. Baldaŭ evidentiĝas ke neniuj ekzistanta civito estas justa. Sokrato

**"La urbo estu nek tro malgranda nek tro granda, sed precize sufiĉe granda por esti integra."
(Platono: *La respubliko*)**



Tiuj kiuj povoscias Esperanton, kaj konas iom da filozofio, ĝuos tiun ĉi tradukon pli ol la etnolingvajn kiujn mikonas. Kompreneble, tiuj kiuj nenion scias pri fakaj postuloj de filozofia lingvaĵo kaj palpe-stumble legadas eĉ beletraĵojn, trovos ke la lingvo ne ĉiam estas "glata" (tiu ĉi ja estas laŭmoda kritikaĉvorto) kaj naive atribuos imagitajn "malglataĵojn" (*endas, onia, elĵetas, maldeziro, malvolo, ...*) al troa(?) volo spuri la originalon. Sed Broadribb perfekte konas la diferencon inter tradukado kaj adaptado: ne adaptaĵon sed elstaran tradukaĵon li liveris al ni. Ĉiuj liaj vortoj deflankiĝantaj de la kongresa lingvo estas konstruitaj pro nepreco trudita de la originalo, kiu, samkiel nia nuna Esperanto, estas inventanta sian filozofian

sencan transplantadon en modernan lingvon per vortoj kiel *moraleco, honesteco, justeco, dececo, rekteco* kaj aliaj. Mi same opinias pri la nebijekcia traduko de ἡ ψυχή (*he psiĥe*), kiu parte kovras la semantikajn kampojn de *animo, menso, psiko* kaj de aliaj vortoj Esperantaj. Broadribb pravis preferi la netradician *menso* al la konfuzosenca *animo*. Ankaŭ la elekto de la vorto *arketipo*, anstataŭ la kutimaj *ideo* kaj *formo*, estas tre trafa. Li metas en parentezon, sub *La respubliko*, la originalan titolon, πολιτεία (*politeja*), ĉar estintus ja tro kuraĝe nomi la dialogon *Politejo*.

Platono ja estas ĉe la komenco de la okcidenta filozofio. Komence de la libro

*Oni nomas "bijekcio" rilatigon de po unu ero de aro A al po unu ero de aro B, kaj reciproke.

ekprovas konceptigi civiton kiu estus tia, kaj konstruas la unuan politikan utopion de nia historio, difinante survoje ĉiujn necesajn konceptojn.

La Platona teksto restas interesa kaj aktuala. Elemento fundamenta de la okcidenta filozofio, ĝi same gravas al leganto de Aŭgusteno kiel al leganto de Hegel' aŭ de Popper'. Nia mondkulturo nepre bezonis tiun ĉi tekston, kaj la fakto ke jam ekzistas po dekoj da tradukoj de *La respubliko* en ĉiuj kulturlingvoj neniel malaltigas tiun neprecon, ĉar ankaŭ Esperanto estas kulturlingvo. Oni ofte bedaŭris malabundon, en nia lingvo, de profundaj tekstoj konstante relegadindaj. Jen libro kiun vi prave metos sur vian nokto-tableton.

Eugène de Zilah (Francio)

Interkulture, ne nur por azianoj

Hanako lernas Esperanton. DOI Ĉieko. Jokohamo: Mevo, 1993. 139p. 21cm. Ilus. 19,50 gld.

Tre ofte instrumaterialoj de Esperanto venas el Eŭropo al Azio. Tio estas bona en kelkaj sencoj: ekzemple, azianoj povas, lernante la lingvon, lerni pri la kulturo de Eŭropo. Sed preskaŭ neniam eŭropanoj alproprigas Esperanton uzante azian studlibron, kvankam unu el la ideoj de Esperanto estas interkultureco. Ĉu pri tio kulpas manko de alt-nivelaj aziaj instruiloj?

Certe ne post la apero de *Hanako lernas Esperanton* de la japana esperantistino DOI Ĉieko el Jokohamo, eldonita kunlabore de membroj de la tiea Esperanto-klubo, la plej granda en Japanio. La libro allogas, krom per interesa rakonto, per multaj historiaj, kulturaj kaj sociaj informoj pri ĉefe Japanio. Sed kiel ĝi povas esti taŭga kaj akceptebla ankaŭ por najbaroj

de Japanio (ĉefe Ĉinio kaj Koreio), kiuj ankoraŭ nun memoras neagra-blajn historiajn okazaĵojn kaŭzitajn de Japanio?



Preskaŭ neniam eŭropanoj alproprigas Esperanton uzante azian studlibron.

La respondo estas simpla: tiu ĉi libro, kontraste al historiaj lernolibroj en japanaj lernejoj, enhavas historiajn faktojn kiuj sincere fluas tra la libro.

Krome, oni trovas interesajn turismajn informojn pri Japanio, kaj la lernantoj konatiĝas kun la historio de E-o kaj de ties kreinto. En la lastaj ĉapitroj ili povas konstati la utilojn de E-o, per la konkreta ekzemplo de rakonto pri vojaĝo de kelkaj Jokohamaj klubanoj al Odeso en Ukrainio kaj pri korespondo kun Hungario.

La gramatiko estas instruita en tre simpla kaj interesa maniero. Bona ekzemplo estas desegno de tri fiŝoj (p. 75), kiujn "Mi estas manĝ-onta/-anta/-inta." La ilustraĵoj de la juna esperantistino JOKOJAMA Miŭako beligas multajn paĝojn kaj aparte la kovrilon.

La libro finiĝas impresoj, kiam la patrino de Hanako, sub la influo de sia filino lernanta Esperanton, pensas en si mem: "Ĉu ankaŭ mi lernu Esperanton?"

Reza Hejr-Hah (Irano/Japanio)

Neformala, tamen komplika

Being colloquial in Esperanto: A reference guide for Americans. David K. Jordan. Lanham: Univ. Press of America, 1992. 267p. 22cm. 51,00 gld.

La titolo ("Paroli neformale en Esperanto") ŝajnas promesplena. Sed eble ĝi vekas tro altajn atendojn, ĉar mi iom seniluziiĝis malkovrinte ke la interna aspekto de la libro estas tiu de sufiĉe tradicia, eĉ tre tradicia, gramatiko. Pli detala ekzamenado tamen montris ke ĝi estas multe pli leginda ol la plejmulto da gramatikoj: verkita laŭ parola stilo, kun sufiĉe amuzaj ekzemploj. La "neformaleco" fakte rilatas pli al la stilo ol al la enhavo mem.

La libro celas novbakitajn usonajn esperantistojn kiuj serĉas anglalingvan gvidlibron pri gramatiko kaj uzado. La unua parto konsistas el rapida trarigardo de la gramatiko, kun aparta atento al demandoj kiuj povus kaŭzi problemojn al komencintoj. La dua sekcio traktas unuopajn vortojn: precipe "falsajn amikojn", paronimojn kaj aliajn, pri kies ĝusta uzado novulo povus havi dubojn.

La libro enhavas multajn utilajn atentigojn pri malsamaj uzoj inter esperantistoj el malsamaj lingvogrupoj kaj kulturoj. Ĝenas min tamen la emo de la verkisto al kvazaŭ-aŭtoritataj

rekomendoj rilate al demandoj pri kiuj ankoraŭ ne ekzistas plena interkonsento, kiel la uzo de akuzativo post *po*. Ŝajnus al mi preferinde ke, prezentinte la alternativojn, la verkisto sufiĉe fidu la saĝon de siaj legantoj por lasi al ili la finan decidon.

Jordan kuraĝe frontas tiklan temon kiun mi neniam antaŭe vidis detale pritraktata en tia libro: la disputon pri *-atal-ita*. Li ne timas rakonti pri la pasioj kiuj ĉirkaŭis la tutan polemikon, kaj ne forgesas la kritikojn kiujn la subtenantoj de la du tendencoj direktis unu kontraŭ la alia. Jen io por ofendi ĉiun! Mia ĉefa kritiko estas tio ke la gramatikaj klarigoj en la libro ĝenerale emas kompiki la traktatajn demandojn anstataŭ prilumi ilin, kio verŝajne donus al novaj esperantistoj la impreson ke la

lingvo estas multe pli malfacila ol oni pretendas.

Kritikinda estas ankaŭ la senrezerva prezento de pluraj neoficialaj vortoj, kies ekzistaro en Esperanto ŝajnas al mi almenaŭ iom diskutinda: *kvesti*, *orangerio*, *novalo*, *lukri*, *lokalo* kaj aliaj. Entute mankas pritrakto de la diversaj sintenoj al neologismoj: surpriza preteratento ĉe verkisto kiu ne timas fronti aliajn simile delikatajn demandojn.

Sume, sufiĉe interesa legaĵo por anglalingvanoj (ne nur por usonanoj). Sed mi hezitus senrezerve rekomendi ĝin al la komencintoj, por kiuj ĝi estas intencita.

Anna Löwenstein (Italio)

Rekorda Societo Zamenhof

Tiu mecenata klubo de UEA, kiu ĉi-jare festas sian 20-jaran ekziston, jam atingis rekordan membronombron de 227 SZ-anoj por 1995. Tio estas 71 SZ-membroj pli ol en la pasinta jaro. Pleje kontribuis al la rekordo jenaj landoj: Francio (15 novaj SZ-anoj), Finnlando (11), Japanio (10), Belgio (9) kaj Aŭstralio (7).

Novaj aliĝoj estas bonvenaj, ĉu rekte al la Centra Oficejo, ĉu pere de la landaj perantoj. Vi memoras ke la SZ-kotizoj egalas al duoblo de la MA-kotizoj. Ne gravas se ni en Tampere devos organizi la akcepton por Societo Zamenhof en la Salono Zamenhof!

Strebo al tutmonda sintezo

Vojaĝoj kaj aliaj poemoj. Edwin de Kock. Antwerpen: FEL, 1992. 148p. 21cm. 21,90 gld.

Jen 25 jarojn post *Fajro sur mia lago* (1967) kaj multaj, ofte mizeraspektaj aŭtoreldonoj, denove poemaro de Edwin de Kock, unu el niaj plej grandaj poetoj, aperas en digna vesto kaj ĉe oficiala eldonejo!

La libro enhavas enkondukon de Jiří Karen, la poemojn, kaj la eseon “Pri mi kaj mia verkaro”.

Karen ĝuste diagnozas kelkajn trajtojn de la poezio de de Kock (kiel lian saltadon inter la tempoj kaj lian neparnasisman versformon), sed ĝenerale li penetras ne tre profunde en ties specifan karakteron.

La plej grandan parton de la poemoj okupas la impresoj de de Kock dum vojaĝo tra Eŭropo kaj Israelo, sed ĉefe la mediteraneaj landoj, en 1985. La poemoj de la ciklo “Vojaĝoj” estas — kun nur du esceptoj — sufiĉe longaj kaj atestas pri ia epopeemo, strebo al

tutmonda sintezo, tiel tipa por la Esperanta literatura kulturo ĝenerale. La histoririĉaj lokoj stimulis la mensan vojaĝadon de de Kock inter diversaj tempoj. Ekzemple, en “Pensante pri Ravenna” li pritraktas la historiajn tavolojn de la loko ne en kronologia vicordo, sed verŝajne en la ordo en kiu li renkontis iliajn memoraĵojn promenante tra Ravenna. “Aŭskultante la ŝtonojn”, superrigardo pri la arkiteturaj monumentoj de la homaro, memorigas pri la optimisma estontovizio en la kvina kanto de *Poemo de Utnoa* de Montagut, kvankam influo en kiu ajn direkto estas neebla.

Ĉiuj poemoj en la rubriko “Vojaĝoj” estas senrimaj. Al supraĵa leganto multaj el ili povas ŝajni liberaj versoj. Sed ĉe analizo ili montriĝas fiksfarmaj, kun (en kelkaj poemoj) po unu senakcenta kromsilabo en ĉiu verslinio.

Preskaŭ same rava kiel liaj poemoj estas lia eseo “Pri mi kaj mia verkaro”. Li lernis E-on por fari ĝin sia literatura verkilo! En tio li estas unika en la historio de Esperanto. La eseo liveras detalojn ĝis nun nekonatajn pri la krizo — en la tuŝareo de la kampoj politika, literatura kaj persona —, kiu produktis tiun kvaŝmiraklon: ioma fremdiĝo de sia gepatra lingvo, la afrikansa; malkontenteco pri sia ĝistiam verkilo, la angla; senkreditiĝo de kaj la afrikansa kaj la angla kiel verkilo pro motivoj politikaj; informoj pri la riĉaj kaj originalaj strukturo kaj stila karaktero de E-o kaj pri ties literaturo. Krome la eseo informas pri multaj aliaj aferoj: lia tre forta anglosaksa kultura orientiteco, la psikologio de lia krea procezo, lia kompreno pri la originala literaturo kiel kulmino de la E-kulturo. Ĉi tiu lasta ne estas nova motivo ĉe de Kock, sed ĝi bezonas ripetadon pro la ankoraŭa troemfazado de la tradukita literaturo de Esperanto fare de multaj esperantistoj.

Willem Verloren van Themaat
(Nederlando)

Eta formato por granda voĉo

Poemoj de Armand Su. Komp. Hu Guozhu, Shi Chengtai. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992. 158p. 18cm. 5,40 gld.

La komenco de ĉi tiu postmorta kolekto konsistas el junaĝaj kaj romantikaj poemoj. Amo kaj printempo profunde trakuras la poeman fluon; feliĉo, ebriiĝo pro amo kaj doloro iras man-en-mane, kun surprize leĝera kaj facila, sed tre flua kaj impresa lingvaĵo. Oni rapide ricevas la impreson ke temas pri supraĵa verkado de puberulo, sed la romantika verkstilo ĉina stampas sian influon videble en la bildojn kiujn li prezentas. La lasta ĉapitro konfirmas la impreson: tie Su reverkis ĉinajn fabelojn poezie en Esperanto, stariante kun ambaŭ piedoj sur la ĉina tero sed kun la kapo en la mondo.

Se la poemaro finiĝus post “Miaj junaj kantoj”, mi facilanime povus diri ke la tuto neniun spuron lasis ĉe mi. Tamen la posta parto, “Buntaj konfetoj”, montras ke Armand Su havis pli da profundo en sia animo. Li same leĝere, sed kun pli da matureco, verkas klasikstyle pri impresoj, pri la admirata kulturo eŭropa, pri la ĉiutaga vivo de ĉino... La parto “Ĵuroj” des pli evoluigas lian personan voĉon, kaj jen aperas la Esperanto-vivo per omaĝoj



Armand Su (1936-1990)

kaj leteroj poeziaj al tutmonda kolegaro, la pli komplikaj kaj pli longaj poemoj, la starpunktoj porpaca kaj idealisma. Tio ĉi kulminas en la poemoj de la antaŭlasta ĉapitro, verkitaj dum la kultura revolucio kiam (en 1968) “li estis arestita pro sia Esp-

poezia verkado” (Shi Chengtai). Tiuj ĉi poemoj plej trafas kaj plej dolorigas en sia simpleco, esprimante kion multaj spertis dum la kultura revolucio,

*Ĉi-lune, Armand Su, pri vi mi sonĝis
dum migdaluj reklamis la printempon —
poeta frato, ĉina frato, viva
post la dekjara tombo de l' karcerro,
en kiu elsunigis vin, verdulon,
“kulturevolucio” mise ruĝa.*

(el “Armand Su liberigita”
de Edwin de Kock)

sed ankaŭ la personan voĉon, kiu nun aŭdeblas plej klare.

Kiel tuto, la poemaro estas tre reprezentata por la verkado de Armand Su — tre eta formato por granda voĉo iom preteratentata en la E-literaturo.

Sabira Ståhlberg (Germanio)

Laste aperis



Asteriks, la gladiatoro (1964). Goscinny. Desegnis Uderzo. Trad. Nedeljko Korasić. Zagreb: Izvori, 1994. 48p. ISBN 953-6157-10-1. 29cm. 15 jarojn post *Asteriks, la gaŭlo*, jen dua aventuro de mondfama bildrakonta heroo. 16,80 gld.

Elektitaj eldiroj de la Sankta Profeto Mohammad. El la angla trad. Adriana J. Middelkoop. Den Haag: Ahmadiyya Islama Komunumo, 1991. 53p. ISBN 90-71624-05-6. 21cm. Dulingva: araba-E. 5,40 gld.

Elektitaj partoj el la verkoj de la Promesita Mesio. Hazrat Mirza Ghulam Ahmad. El la angla trad. A. J. Middelkoop. Den Haag: Ahmadiyya Islama Komunumo, 1991. 78p. ISBN 90-71624-07-2. 21cm. Dulingva: araba-E. De fondinto de islama komunumo. 6,60 gld.

Esperanto. Noĵiuni fundamentale ale limbii internaŭionale iniĉiate de L.L. Zamenhof (1973). Saul Osias (1900-1984). Craiova: AIUS, 1994. 242p. ISBN 973-96340-3-6. 19cm. Historia kaj lingva enkonduko por rumalingvanoj. Enhavas la Fundamentan Ekzercaron kaj la Universalan Vortaron. 13,50 gld.

Esperanto kaj Livorno. L'esperanto e Livorno. Giuliana Rossocci Bastogi (1924). Pisa: Edistudio, 1994. 79p. ISBN 88-7036-065-2. 21cm. Kromkovrilo. Dulingva: E-itala. Historio de loka movado. 18,00 gld.

Esperanto-literatuur van de laatste 25 jaar. Enkele kanttekeningen. Gerrit Berveling (1944). Den Haag: Esperanto Nederland, 1994. 28p. 21cm. Prelego pri la E-literaturo de la lastaj 25 jaroj. 9,90 gld.

Fantomrakontoj. Lafcadio Hearn (1850-1904). El la japana trad. Ĉimura Ŝiroo. Higasimurayama: Librejo Satano, 1995. 65p. 18cm. Naŭ historiaj kaj fabelecaj rakontoj de brita aŭtoro japaniĝinta. 9,90 gld.

Graĵoj. Malte Markheden (1911). Sjö Haga: la aŭtoro, 1994. 58p. 21cm. Rakontoj kaj historioj pri Svedio. 10,80 gld.

Intrigo. Aleksandro R. Mollison. Dundee: Kelto, 1995. 59p. 21cm. Tri frivolaĵoj rakontoj. 9,00 gld.

Jarkolekto "Esperanto" 1994. 220p. 27cm. Bindita. 51,00 gld.

Kantoj poemoj kaj satiroj. Robert Burns (1759-1796). El la angla trad. Reto Rossetti, William Auld. Glasgow: Kardo, 1995 (2-a eld.). 73p. ISBN O 905149 26 2. 21cm. La plej granda skota poeto trovas ĉe du samlandanoj indan interpreton. 8,70 gld.

Klingona lingvo. La tihingan Hol. Leci-onoj 1 kaj 2. David Barron. El la angla trad. Ulrich Matthias. Neckarhausen: la tradukinto, 1994. 15p. 21cm. Enkonduko en lingvon inventitan por la filmserio *Star Trek*. 2,40 gld.

Klopodu kompreni min! Instrukcilibro por gepatroj de aŭdodifektitaj infanoj. Aira Kankkunen (1928). Buchholz in der Nord-

heide: MZ, 1994. 50p. ISBN 3-89240-085-7. 21cm. Ilus. Verkita laŭ propra faka sperto, jam tradukita en naŭ lingvojn. 13,20 gld.

Konciza gramatiko de Volapuko. Gramat brefik Volapüka. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1995. 47p. ISBN 2-906134-27-9. 21cm. 14,40 gld.

Lernolibro pri oftalmologio (1959). Seiĉi Kato (1910-1987). Buchholz in der Nordheide: MZ, 1994 (3-a eld.). 126p. ISBN 3-89240-088-1. 21cm. Enkonduko en la okulsciencon. Kun ĝisdatigaj piednotoj. 22,20 gld.

Mastrino de Deŭntrun, La. Aleksandro Mollison. Dundee: Kelto, 1994. 34p. 21cm. Amhistorio el la jaro 1895. 5,40 gld.



Premier colloque d'interlinguistique: Contributions. Red. Tazio Carlevaro. Bel-linzona: Hans Dubois, 1994. 114p. 21cm. Kontribuoj al interlingvistika kolokvo en La Chaux-de-Fonds (1994). 6 en Esperanto, 2 france, 1 itale. 53,40 gld.


Shi jie yu. Esperanto. Soliva (Shao Rong, 1925). Dalian, 1986. 290p. 18cm. Lernolibro por ĉinaj studentoj. 9,00 gld.

Sklaroj, La. Aleksandro R. Mollison. Dundee: Kelto, 1994. 64p. 21cm. Satira futuraĵo pri socio kie viroj estas sklavoj. 9,90 gld.

Triopo de ama siropo. Aleksandro R. Mollison. Dundee: Kelto, 1995. 60p. 21cm. Tri noveloj pri malpermesata amo. 9,00 gld.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Franz Okelmann. Bayreuth: la kompilinto, 1993 (3-a eld.). 370p. 21cm. Bind. Ordigita laŭ alfabeto ordo de vortoj anstataŭ de radikoj. 36,90 gld.

Zamenhof ou la langue internationale. Ghislaine Tilleux, Bruno Disano, François Craenhals. Charleroi-Marcinelle: Association pour l'Espéranto, 1994. 15+11p. 21cm. Bildrakonto pri Zamenhof, kun bazaj E-informoj. 14,10 gld.



La eldonejo MZ de Harald Schicke inundas per fakaj libroj facile kompreneblaj. (Vd. ankaŭ Mi resanigis PPPetron.)

Meditoj doloraj kaj amuzaj. A. López Luna (1914). Buenos Aires: Amigos de López Luna, 1995. 120p. ISBN 950-43-5695-8. 16cm. Pripensoj religiaj kaj aliaj + "Historio de senbrida pasio". 9,90 gld.

Mi resanigis PPPetron. Pero Ĉimbur. El la kroata trad. Lucija Borčić. Buchholz in der Nordheide: MZ, 1995. 135p. ISBN 3-89240-090-3. 21cm. Kiel superi balbutadon: persona rakonto. 22,20 gld.

Orelingo, La. Ajnaĵoj kaj Ŝimstatoj. Poemoj. Jopetro Danvy (1952). Thaumiers: LKKK, 1994. 19p. 30cm. Teatraĵeto en aleksandroj, kaj poemoj el 1977. 8,70 gld.

Paĝoj por komencantoj (Tamen ne por infanoj). János Sárközi (1932). Debreceno: Debrecena Bulteno, 1994. 54p. 21cm. Rakontoj verkitaĵoj per 700 bazaj vortoj. 9,60 gld.

Plumprovo. Boris A. Zozulja (1941). Verda Kukolo, 1994. 23p. 18cm. 14 poemoj, kaj originalaj kaj tradukitaĵoj, de rusa aŭtoro. 3,00 gld.

DIVERSAĴOJ

T-ĉemizo "Kontakto". TEJO, 1994. En la mezuroj L, XL kaj XXL. 16,20 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en la Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Ĝustigo

La eseo *La evoluo de la mondkulturo (Intelligor omnibus)* de Jeremi Gishron (Jerusalem: Centro Sivron, 1994; 6,00 gld.), registrita en la januara rubriko "Laste aperis", ampleksas fakte ne 24, sed 48 paĝojn.



• Aŭstrio: IEMW, nia vitrino

Internacia E-Muzeo Vieno (IEMW) ŝanĝis siajn 50-jarajn vitrinojn je novaj. Per tio finiĝas moderniga fazo de IEMW, kiu nun prezentas E-on ankaŭ per kasedilo, vidbendilo kaj informoj en ses lingvoj. Ĉiam pli vizitata en la lastaj jaroj — precipe el eks-socialismaj landoj —, IEMW ankaŭ aranĝas kulturajn semajnfinojn, kies partoprenkotizoj diferencas laŭ la nacia produkto de ĉies devenlando. (*La Dua Jarcento*)

• Bjelorusio: Korespondanta kurso

Post adapto kaj enkomputiligo de lernolibro, la Minska E-klubo Verda Lumo lanĉis korespondan kurson. La nunaj 15 gelernantoj ekinteresiĝis plejparte pro artikolo, en pasinta oktobro, de la junulara gazeto *Znamja Junosti*. (M. Ŝelestov)

• Benino: Ruĝkruca kursejo

Amidou Seko (ĉi-sube, plej dekstre) volontule helpas ĉe la Ruĝa Kruco en Parakou kaj rajtas uzi ties ejon por sia E-kurso. (H. Bakker)



Brazilo: E-o ĉe universitatoj

E-o estas bone akceptita en la akademio medio brazila: okazas E-kursoj ĉe la universitatoj de Ceará, Juiz de Fora kaj Sete Lagoas. En San-Paŭlo studenta E-asocio, sub gvido de Marcos Zlotovich, ofertas E-on al la studentoj per kursoj kaj prelegoj. (*Brazila Heroldo*)

• Britio: Gubbins lingvopolitike

Dum internacia konferenco de Esplor-instituto pri Eŭropaj Studoj, la 11-an de nov. ĉe la universitato de Salford, UEA-delegito d-ro Paul Gubbins prezentis referaĵon pri "Alternativa lingvopolitiko por Eŭropo". (*Esperanto Teacher*)

• Ĉeĥio: Ĉeĥe ĉe ĉeĥoj

Korean vesperon prezentis februare, en la Praga Esperanto-klubo, tri junaj gekoreoj, kun rakontoj kaj popularaj kantoj el sia lando. Unu el ili alparolis plejparte ĉeĥe, fierante pri la rezulto de sia lingvostudo. (J. Mařík)

• Ĉinio: Kroniku kun Liaoning

Liaoning E-Asocio festos la 9-an de junio sian 10-jariĝon. Por publikigi ĉi-okaze sian kronikon, ĝi petas ĉiujn e-istojn kiuj vizitis Liaoning, sendi valorajn informojn ĝis la 10-a de majo. Por ekspozicio de enlanda kaj eksterlanda gazetaro kaj filatelo pri E-o, ankaŭ gratul-salutoj bonvenas ĉe: Wu Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Liaoning-sheng, Fushun.

Ĉe kosmetik-vendejo de e-istino Fu Tao en subtera bazaro de Changchun, la loka E-asocio fondis, la 8-an de novembro, Esperantan konsulejon kun informtelefono. (Liu Ming-hui)

• Irano: Arte teksu Esperanton

Dank' al instruisto S. Pakravan (ĉi-sube, meze), laboristoj kaj oficistoj de grandega teks-arta fabriko en la okcidenta-irana urbo Borujerd lernas E-on. Pere de Masud Gudarzy (No. 38, Sh. Maleki Lane, Siavosh Str., Azadi Ave., IR-69188 Borujerd) ili invitas esperantistojn pasigi tempon en ilia antikva kaj turisma urbo, kaj ankaŭ atendas komercajn ofertojn.



• Estonio: Radio neniam ĉesis

Dum la 24-a Konferenco de E-Asocio de Estonio (28 jan., Tallinn), la agadraporto konstatis mankon de junularo, sed ankaŭ atingojn kiel: sukcesaj naturprotekta seminario kaj Balt-regionaj E-Tagoj (vd. okt., p. 177); tria eldono de lernolibro por komencantoj (Ojalo); pluaktivado de kluboj en Tallinn, Tartu kaj Pärnu; ekfunkcio de E-Instituto de Estonio; daŭraj radioelsendoj Esperantaj. (Mallaŭ informoj antaŭaj, ĉi tiuj neniam ĉesis, nur estis dum 1994 nekapteblaj je meza ondo).

La 37 delegitoj elektis 14-kapan estraron kaj novan prezidanton: Ahto Kaljusaar, 56-jaran ĵurnaliston el Tallinn. Lia antaŭulo, Jaan Ojalo, iĝis honora prezidanto. (F. Neeme, *Eventoj*)

• Francio: Denove E-kabareto

Iniĉate de Michel Audibert kaj Vincent Charlot, kaj kun konsento de Jean Thierry, la 31-an de marto malfermiĝis Esperanta kabareto en Parizo, ĉe la restoracio Au Rendez-vous des Amis ("Rendevuejo de amikoj"; 23, rue Gabrielle). (*La Parizano*)

• Hungario: Fruktoj de malfavoro

La E-kursojn de Katalin Smidélus en Szombathely frekventas pli ol 50 studentoj en 1994/95. Resumante en *Debrecena Bulteno* siajn E-instruajn spertojn en tempo kiam la oficiala statuso de E-o daŭre ŝanĝiĝadis ĉe ŝia altlernejo, ŝi rimarkigas ke ĝuste "multe pli da veraj e-istoj fariĝis el tiuj" kiuj lernis la lingvon en periodo de oficiala malfavoro.

Daŭre funkcias la internacia koresponda kurso de Hungaria E-Asocio (Pf. 193, HU-1368 Budapeŝto), kies kotoz diferencas laŭ nacia enspezo. (Ekz. nederlandanoj pagas 150, hungaroj 40, pakistananoj 12 gld.) HEA trovas solvon ankaŭ por nepagipovuloj.

• Israelo: Ortodoksa invito

La ortodoksa E-Centro Sivron (P.O.K. 231 80, IL-91231 Jerusalemo) bonvenigas kunlaboron de homaranistoj/hilelistoj, bibliistoj kaj filosemitoj, kaj sendas provekzempleron de sia *Jerusalema Bulteno*. (J. Gishron)

• Italio: Ekspozicio en Torino

Kunlabore kun komitato por informado pri la programoj de Eŭropa Unio, Torina E-Centro aranĝis Esperanto-ekspozicion inter la 1-a kaj la 15-a de februaro. Pri la inaŭguro kaj posta debat-prelego informis la loka gazetaro. (P. Aguilar Solà)

• Japanio: Gvido pri ne-vido

Rokuro Makabe (Germanio) japanigis, pere de E-o, origine nederlandlingvan broŝuron pri helpo al blinduloj. *Ne tiel sed ĉi tiel* de H. Van Dyck (2,60 gld. en Esperanto ĉe UEA) estos presita en miliono da ekzempleroj.

Fine de 1994 la kompanio Tokyo Wave produktis, sub la gvido de d-ro Tsukasa Kobayashi (estrarano de Japana E-Instituto), la unuan parton de la kolora vidbendo *Komprenebla internacia lingvo Esperanto*. La 30-minuta ero, pri la historio de Esperanto, estis elsendita la 27-an de januaro el la studio Asahi New Star CS-TV. Baldaŭ pretiĝos la dua parto, pri gramatiko. (T. Kobayashi)

• Kroatio: E-Ligo maldormas

"Kroatio E-Ligo, la landa asocio de UEA, dormetas" — skribis U. Lins en jan. (p. 5). Vekiĝon indikas ke la 21-an de jan., en 40-homa jarkunveno, KEL elektis novan estraron, kiu prioritare celas restarigi firman financon bazon kaj solvi la sidejan problemon. En la kunveno Kemal Jakupović, rifuĝinto el Bosnio, dankis pro ĉiu helpo kiun kroataj e-istoj donis al bosniaj e-istoj. (S. Štimec)



• Pakistano: La horo de Lahoro

Pakistana E-Asocio kunvenas dufoje jare. Dum la vintra kunveno (22-23 dec., Lahoro) PAKESA elektis estraron por 1995-96 (vd. bildon). Ĝenerala sekretario Amjad Butt donis duhoran publikan prezenton pri Esperanto en fama Lahora hotelo. (A. Munir)

• Niĝerio: Prince televide

Lastatempe Prince Henry O. Ogunye, motoro de la tiulanda movado, estis intervjuita en la ŝtata televido. (*Heroldo*)

• Norvegio: Pakto de ne-atako

Konsiderante ke ili laboras "ĝis certa punkto por la sama celo", Norvega Esperanto-Ligo kaj la norvega asocio por Interlingua interkonsentis pri "pakto de ne-atako". (*Norvega Esperantisto*)

• Pollando: La nekongreso

Antaŭ la novembro konferenco de Pola Esperanto-Asocio (jan., p. 6), la 26-a Pola E-Kongreso estis kunvokita por la 19-a ĝis la 23-a de oktobro en Staszów. Ĝi tamen malokazis, ĉar ĝis la limdato aliĝis nur 11 personoj. Ja aperis ampleksa kongreslibro: la historia kuriozaĵo estas mendebla ĉe Andrzej Sochacki (skr. poczt. 3, PL-28-200 Staszów).

• Portugalio: Mono subtena ĉiam bonvena

Portugala E-Asocio duobligis sian bonhaston per la plej granda mondonaco iam ricevita en sia 22-jara ekzisto: 300 mil eskudoj (ĉ. 3200 gld.) La sumo alvenis de la banko Montepio Geral post subvencipeta letero de PEA, kiu aludis la "knabaĝan esperantemon" de la banka administraciestro. (*Nia Bulteno*)

• Togolando: Junulara magazino

Dank' al nederlanda helpo, aperis dua numero de *Junulara Magazino Togolando*, kiun dissendas Hans Bakker (adreso en la kolofono). Redaktoro Yao Afantchao-Biakou (B.P. 20225, Lomé) — ankaŭ prezidanto de Unuiĝo Togolanda por E-o — invitas sendi pere de li bildkartojn kaj pedagogiajn materialojn al la 7-10-jaraj geknaboj lernantaj E-on en la lernejo "La Volière", kaj gratulojn al ties fondinto, s-ino Boukpesi.

• Uzbekio: Helpas Stabileco

E-istoj nun povas kunveni en la Taŝkenta sidejo de la t.n. Fonduso de Socia Stabileco, kiu havas Esperantan fakon. La 20-an de novembro Gafurjan Mirzabajev raportis en la ĉefurbo pri planoj instrui E-on en la loka universitato de arto, fondi mez-azian centron, kaj eĉ aranĝi UK-on en Taŝkento, kie jam du mezlernejoj instruas E-on. La unua lernolibro por uzbekoj atendas eldonon. (*Movado*)



• Bildkartoj: Vorta arto sur karto

La ĉi-suba vortoplana bildkarto de Rolf Ernst (Svislando), portretanta la amaskulturon de Esperantio, ekfuroras ĉe la Libroservo de UEA (0,60 gld.).

Du aliaj tri-monataj francaj stampoj, en Aix-les-Bains kaj en Gray (1 feb. - 8 apr.) informas pri regionaj E-kongresoj aprilaj. La Nacia E-Muzeo (19, rue V. Hugo, FR-70100 Gray) sendas kontraŭ 10 frankoj (pagu ĉeke aŭ per poŝtmarkoj) ĉi lastan + du faldfoliojn kaj foton pri la muzeo.

• Handikapuloj: Helpo per hejmlaboro

Iniciate de la Sankt-Peterburga E-societo Espero (jan., p. 5), en julio 1994 fondiĝis ASISTO, fonduso de e-istoj-



• Eksteraj rilatoj: Tutmonda najbaraĵo

UEA estis reprezentata de Rochelle F. Grossman la 26-an de jan. en Novjorko, kiam du membroj de Komisiono pri Tutmonda Mastrado, la Zamenhof-premiito Sir Brian Urquhart kaj Barber Conable, prezentis ĉe UN la raporton "Nia tutmonda najbaraĵo" al neregistaraj organizoj. (Novjorka Prismo)

• Filatelo: Esperanto-stampoj

Naestved E-Unuiĝo (Fyrrevaenget 4, DK-4700 Naestved, Danio) aranĝas dum la tuta jaro, kontraŭ respond-kuponoj, la enpoŝtigon de kovertoj kun danlingva stampo "Esperanto — interpopola lingvo", uzata tra 1995 en diversaj urboj de Danio. Simile faras la asocio TAKE (RN 83, Rue du Tiefenbach, FR-68920 Wintzenheim-Colmar, Francio) rilate stampon kiu reklamas dum tri monatoj la 50-an Kongreson de SAT-Amikaro (15-18 apr.), organizatan de TAKE.

invalidoj, kiuj serĉas kontaktojn kun similaj organizoj. ASISTO (Ab. ja. 130, RU-197022 Sankt-Peterburgo, Rusio) provizas handikapulojn per hejmlaboro, ekz. komputila preparo de libroj, kaj volonte gastigos tiujn kiuj helpas akiri malnovajn XT kaj AT IBM-kongruajn komputilojn kaj printilojn.

• Informado: Revuoj en Rumanio

Socia-kultura magazino hungarlingva en Rumanio, *A Hét*, kiu en 1993 transprenis nian intervjuon kun Umberto Eco, aperigis (16 dec.) ĉapitron el *La serĉado pri perfekta lingvo* de Eco (vd. okt., p. 161) kaj nian Seltentintervjuon (3 marto). Lenke Szász tradukis ĉiujn tri. En la same rumania *Magyar Szó* Jozefo E. Nagy hungarigis la intervjuon kun Daniel Tarschys (18 feb.) kaj startigis semajnfinan E-kurseton en marto. La turisma revuo *România Pitorească* publikigis en novembro (rumane) la artikolon "2 milionoj da homoj parolas E-on" de Ionel Onet.

• Instruado: Interaktiva disko

Esperanto Teacher, organo de la brita asocio de E-instruistoj (ETA), anoncas ke baldaŭ aperos kompakta stordisko (CD-ROM) kiu interaktive instruas plurajn lingvojn. Esperanto estos inter tiuj, dank' al ETA-membro.

En la sama revuo Alan Smalley, ĉeflekciisto pri la franca ĉe universitato en Leeds, rakontas kiel li donis miniaturan E-kurson al ĉ. 200 studentoj kadre de programo destinita por "konsciigi pri la fenomeno lingvo". Pli frue neniu el la 200 konis E-parolantojn, kaj 40% eĉ ne aŭdis pri E-o.

• Jurnalismo: La plej bonaj

Internacia Ĵurnalististo, organo de Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), enketis ĉe redaktantoj de E-periodaĵoj pri "la plej bonaj E-gazetoj". Iĵ "kun hezito publikigas la rezulton", ĉar nur 22 enketiloj revenis. Laŭ tiuj, la plej bonaj estas: *Brita E-isto* (primovada nacia), *Esperanto* (primovada internacia), *Literatura Foiro* (fakrevuo) kaj *Monato* (nemovada).

TEĴA lanĉis trejnkurson pri ĵurnalismo, kiun gvidas Paul Gubbins (3 Arden Court, Mossley, Congleton, Britio CW12 3JH). Ĉar aliĝis pli da personoj ol atendite (super 20), TEĴA nun serĉas spertajn ĵurnalistojn por revizii taskojn de la kursanoj.

• Konkurso: Afiŝoj pri toleremo

En la Internacia Jaro de Toleremo, Unesko anoncas konkurson de afiŝoj pri "Ĉiutaga toleremo" por membroj de neregistaraj organizoj en rilatoj kun Unesko (do, ankaŭ UEA-membroj) kaj — en aparta kategorio — por infanoj ĝis 15-jaraj. Limdato: 31 majo. Petu detalojn de nia redakcio.

• Literaturo: Nur dek verkoj

En la konkurso Ivo Rotkviĉ '94 kandidatis nur dek sendaĵoj. Premiigis Kreŝimir Janković (Kroatio) por la originala poemo "Vespero sur la bordo", Zbigniew Czupkałło (Pollando) por la tradukita poemo "Kanzono" de Jaroŝław Iwaszkiewicz, Dragutin Balagović (Kroatio) por la rakonto "Elektristoj", kaj Stefan MacGill (Hungario) por la libro *Tendaraj tagoj 3*. (M. Beloŝević)

• Radio: Pola ŝanĝo

De la 26-a de marto la elsendo de Pola Radio je 22.30 (mez-eŭropa tempo) aŭdeblas, krom je 6135 kHz (49 m), ankaŭ je 6095 kHz (49 m), kio

verŝajne aparte taŭgas por Benelukso, Britio, nordaj Germanio kaj Francio. (A. Pettyn)

• **Rasismo: Kontraŭ-seminario**

Post la sukceso de la pasintjara kontraŭrasisma seminario en Glienecke (Berlino), Esperanto-Junularo Brandenburg/Berlin (Berliner Str. 49, DE-14467 Potsdam, Germanio; tel. +49/331/294-003), anoncas duan seminarion por 12-14 majo, samloke. Gvidos profesiaj kontraŭrasismaj klerigantoj: Elisabeth Schwarzer, Encarna Teruel kaj Siang Be. (S. Trenner)

• **Sano: Spirite kaj korpe**

Ĝus fondiĝis Rumana E-Asocio por Sano. Ĝia prezidanto, d-ro Caius Chiriță (C.P. 353, București), ankaŭ redaktas la REAS-organon *Medicina Informilo*, kiu aperos dumonate. (I. Budaházy)

La 20-mil-membra Amikaro Bruno Gröning, okupiĝanta pri saniĝo per spiritaĵoj, aktivis jam de kelkaj jaroj en Esperantujo. Nun kvindek

el ĝiaj membroj eklernis E-on post propono de ilia gvidantino Grete Häusler, kies filino partoprenis la Seulan UK-on. (D. Meier)

Okaze de la vjetnama eldono de sia libro *Orienta speciala Diina masago*, SAIONJI Masayuki vizitis en decembro (15-20) Vjetnamion. En Hanojo li demonstros sian Yumeiho-terapion en armea hospitalo, antaŭ 300 oficirkuracistoj. (NGUYEN Quang)

Dimitar Krastev (Ljubljana 70, BG-1619 Sofia, Bulgario), lerninto de Saionji, ellaboris "profitigan vivstrategion", kies parto estas "Duonika", gimnastika ekzercaro por duopoj.

• **Scienco: Pirlot premias**

Fonduso Pirlot, kiu stimulas eldonon de sciencaj verkoj E-lingvaj (ne esperantologiaj) fare de membroj de Akademio Internacia de la Sciencoj, aljuĝis sian unuan premion en 1994 al D. Maxwell, M. Preotu kaj A.-P. Tacu, redaktintoj de la prelegaro *Lingvo kaj kibernetiko*. Informoj: Germain Pirlot,

Steenbakkersstr. 21, BE-8400 Oostende, Belgio.

En la ĉina turisma urbo Putuo kunvenos (13-16 julio) la Dua Esperanta Sciencteknika Simpozio de Zhejiang-provinco (la unua okazis en decembro 1993). Prelegoj bonvenaj ĉe Zhao Shoutang: Zhejiang, Huangyan-shi, Yao Jian Suo, CN-317400, Ĉinio.

• **Sindikatoj: Translima solidaro**

Laŭ propono de André Martin, kunveninto en la "labora borso" de Charleville-Mézières (Belgio) sendis, la 24-an de feb., solidarec-mesaĝon france kaj Esperante al strikantaj germanaj metal-laboristoj. (A. Martin)

• **Virinaj aferoj: Pekina forumo**

AIHARA Misako (Tuga 3-15-13, Wakaba-ku, Tiba-si, 260, Japanio) alvokas e-istinojn aliĝi al la Monda Forumo pri Virinoj (29 aŭg. - 3 sep., Pekino), kie japanaj e-istinoj intencas laborkunsidi pri Esperanto kaj eldandi la partoprenantojn pri lingvaj problemoj.



• **Hasala: Filatela honorsigno**

Vláda Hasala, delegito en Strážnice (Ĉeĥio), kiu kunfondis kaj prezidas la E-sekcion de la Asocio de Ĉeĥoslovakaj Filatelistoj, ricevis pasintjare unuagradan honorsignon de AĈF pro sia laboro sur la kampo de Esperanta filatelo.

• **Novobilský: Rektoro en Ústí**

La 60-jara Vlastimil Novobilský, ĉeĥa ĥemiisto kaj aktiva e-isto ekde la junaĝo, ekdeĵoris la 1-an de marto kiel rektoro de la universitato en Ústí nad Labem. (J. Mařík)

• **Wilson centjara**

Nia plej aĝa dumviva membro, Jeannie Wilson (Nov-Zelando), fariĝis 100-jara la 10-an de marto. Ŝi estis ankoraŭ delegito en 1992!

• **Dzięgielewska: Prefere Jadwiga**

La nomo de Jadwiga Dzięgielewska daŭre revenas en raportoj pri polaj



E-aranĝoj ekde 1992. Akompanate de Grażyna Nazarko, Dzięgielewska kanzonas sub sia pli simpla nomo Jadwiga. Ŝia repertuaro, baldaŭ prezentota sur kasedo, vastas de Geraldo Mattos kaj Nikolaj Kurzens ĝis Jacques Brel kaj Bulat Okuĝava. Jadwiga (ul. Golańska 12 m. 16, PL-30-619 Kraków, Pollando) pretas recitali ankaŭ en eksterlandaj E-eventoj.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

• **Kervers 80-jara**

Els Kervers, UEA-delegito, eks-prezidantino de Nederlanda E-Asocio kaj multjara komitatano de UEA, fariĝas 80-jara la 10-an de aprilo. Ŝi instruis Esperanton al centoj da gejunuloj en Niĝerio kaj plu kontribuas al la afrika agado de UEA.

Sigmund BLIKSHAVN (1915-1994), fakdelegito pri mekaniko dum pli ol 20 jaroj, mortis la 31-an de decembro en Haugesund (Norvegio).

Raoul CAHOUE (1931-1994) mortis la 5-an de decembro. La urbo Vierzoon (Francio), kie li estis delegito, decidis inaŭguri dulingvan memorplaton je lia memoro.

JANG Hui-sok (1909-1994) forpasis en Seulo la 8-an de novembro. Universitata profesoro pri filozofio, li estis pionira e-isto, gvidkomisionano de Korea E-Asocio kaj UEA-delegito, aŭtoro de la kore-lingva *Pacismo de Zamenhof*.

Stig JOHANSSON (1918-1994), dumviva membro, forpasis en Tomelilla (Svedio).

Marcel LIGOT (1912-1995), delegito dum pli ol 20 jaroj, forpasis antaŭ nelonge en Fréhel (Francio).

Henri LURIÉ (1905-1994), franca inĝeniero kaj filozofo, tradukinto de Spinoza kaj Goeto, fervora subtenanto de Esperanto, mortis la 7-an de aŭgusto 1994 en Englewood (NJ, Usono).

Pauli RIIHIVAARA (1903-1995), iama orgenisto de la katedralo de Turku, forpasis la 27-an de januaro en Pori (Finnlando). En la sesdekaj jaroj li gvidis la E-koruson Amikaro, kiu koncertis i.a. en la Helsinka UK (1969). Li estis ŝatata kursgvidanto (1958-1976) kaj honora membro de la E-Societo en Turku, kiun li kunfondis.

Kurt SCHUT (1927-1994), delegito en Wesel (Germanio) ekde 1970, mortis la 29-an de decembro.

TOKUDA Rokuro (1904-1995), delegito pli ol 20 jarojn en Sizuoka (Japanio) kaj amiko de la ĉinaj e-istoj eĉ dum la Kultura Revolucio, mortis la 10-an de januaro.

Marie-Thérèse VALANTIN (1899-1994) forpasis novembre en Bourges. Dojeno de la franca movado, ŝi helpis la renaskiĝon de Unuiĝo Franca por Esperanto post la dua mondmilito.

DANIELA LEJLA BRECHBÜHL

artistino de la svisa nacia cirko preterpasis tiun ĉi mondon sabaton, 11 februaro 1995.

Bonvolu preĝi por ŝi:

HO MIA DIO! Ho Vi Pardonanto de pekoj! Donacanto de donacoj! Dispeliganto de afliktoj!

Vere mi petegas al vi, ke Vi pardonu la pekojn de tiuj, kiuj forlasis la korpan vestaĵon kaj supreniris en la spiritan mondon.

Ho mia Eternulo! Purigu ilin je pekoj, dispelu iliajn malĝojojn, kaj ŝanĝu ilian mallumon en lumon. Enirigu ilin en la ĝardenon de feliĉo, purigu ilin per la plej pura akvo, kaj permesu, ke ili rigardu Viajn brilecojn sur la plej alta monto.

'ABDU'L-BAHA

Kiam ŝi venis al Bielo por lerni Esperanton kun mi, ŝi iris al la tombo de sia frato kaj preĝis Esperante ĉi tiun preĝon por li. Ŝi postlasis bildojn kun Esperanto-teksto.

(Parzival)

OFICIALA INFORMILO

SOCIETO ZAMENHOF 1994

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Sume por 1994 entute 156 SZ-anoj.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: Philippe Berizzi. Japanio: Yukio Izumi; Haruyuki Sugibayasi. Svislando: Dieter Rooke.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Germanio: Heinrich Nischwitz.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Usono: Patricia Egan.

AMIKOJ (minimumo \$10): Usono: Ronald J. Glossop.

PATRONOJ DE TEJO 1995

Francio: André C.J. Gaillard; Barbara Despiney; Claude Longue-Épée; Maurice Feneyrol; Roger Despiney. Japanio: Utako Kobayasi; Sadako Nagura; Yosiki Tatum. Litovio: Paul K. Jegorovas. Sume por 1995 ĝis nun 76 Patronoj.

SOCIETO ZAMENHOF 1995

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Aŭstralio: Idyss Einihovici. Belgio: Francine Sperber. Brazilo: Marija Pozder Almada. Britio: Eric W. McCanlis; E.R. Waterworth; Harold Filtingham. Danio: Ejnar Hjorth; Ole Therkelsen. Finnlando: Irja Klemola; Pentti Järvinen. Francio: Alexandre Maczkowski; André C.J. Gaillard; Bérengère Cheverry; Claude Longue-Épée; Clara Troper; Féodor Jelenc; Auguste Huberdeau; Jeannine Croze; Julia Guillaume; Jeanne Roy; Jeannine Vincent; René Lemaire; Pierre Leroy; Roger Despiney. Germanio: Heinrich Nischwitz; Helga Erhard. Italio: Paolo A. Bonomi; Unione E-ista Romagnola. Kanado: Merle Haltrecht-Matte. Korea Resp.: d-ro Lee Chong-Yeong. Litovio: Paul K. Jegorovas. Nederlando:

ANONCETOJ

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kovrilpaĝo.

Leterojn, kartojn ktp. deziras tutmonde interŝanĝi s-ro A.P. Soares, Caixa Postal 421, BR-50001-970 Recife (PE), Brazilo.

Okaze de 10-jariĝo (3-an de majo 1995), denaska e-isto ŝatus ricevi salutojn kaj motiv-poŝtmarkojn (floroj, bestoj, ŝipoj!): Markus Moser, Gasteiner Str. 31, DE-10717 Berlin, Germanio.

Mag. G.F. Makkink; Jan Otto de Kat. Norvegio: Olav Bjørnsrud. Slovenio: Jožica Židanik. Svedio: Adam Zorkrot; Sten Axel Broman; Eugen Rytenberg; Jack Snarberg; Nils Gustav Johansson. Usono: Robert A. Swenson; William R. Harmon. Sume por 1995 ĝis nun 223 SZ-anoj.

DONACOJ 1995 (gld.)

ĝis la 28-a de februaro

Fondaĵo Afriko: Britio: B.W.G. Phillips 40,35. Finnlando: H. Jaakkola 908,25. Sumo ĉi-jara 1153,10.

Fondaĵo Canuto: Francio: S. Amariglio 32,35; M. Basso 11,29; A. Gaillard 96,75; A. Hubert 32,35; R. Lemaire 200,00; M. Massemin 42,05; T. Nowak 38,70; A. Tailpied 32,25; J.C. Trebouet 64,69. Germanio: W. Heinrich 559,25; G. Macioszek 124,15. Hispanio: P. Méliuz Irache & C. Guerra Vegas 86,49. Svislando: A. & C. Bickel 65,94; D. Cohen 30,41; F. Gabbrielli 109,74; C. Sixtus-Pot 30,41; E. Walder 50,24. Diversaj malgrandaj 6,47. Sumo ĉi-jara 1970,16.

Generala Kaso: Anonime 250,00. Britio: J.H.R. Marns 52,50. Germanio: H.J. Borgwardt 26,84. Svedio: R. Moln 22,55. Svislando: C. Blanc 10,58; D. Bühlmann 66,11; F. Liechti 11,90; W. Schaufelberger 38,34; G. Weill 13,22. Diversaj malgrandaj 30,41. Sumo ĉi-jara 1951,37.

Konto Espero: Britio: P. Danning 50,00; A. Vincent Jones 67,39. Francio: S. Amariglio 32,35; M. Basso 25,80; M.J. Basso 11,28; P. Forget 80,87; A. Gaillard 96,75; R. Lemaire 200,00; A. Tailpied 32,25; J.C. Trebouet 64,69. Svedio: J. Snarberg (por e-istoj de Kôbe) 225,50. Diversaj malgrandaj 6,46. Sumo ĉi-jara 927,74.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: W. Akkerman 50,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

La 82a Japania Kongreso okazos en Jokohamo

1995-10-13 (ven.), 14 (sab.), 15 (dim.)

- temo: "Ni vojaĝu al la nova epoko!"
- loko: Techno Tower Hotel kaj aliaj en la urbo Jokohamo
- kotizo: el eksterlando ¥10,000 (ĉ. \$100) (kun 2 tranoktoj, bankedo kaj 2 matenmanĝoj)

Se vi deziras kanti, danci, prelegi aŭ prezenti vian landon, ni volonte akceptas viajn dezirojn.

Vizitu Japanion okaze de la Japania Kongreso!

organizanto:

Jokohama Esperanto-Rondo
Saido 1-18-14, Koonann-ku
JOKOHAMO, 233 Japanio
tel. kaj fakso: 81-45-785-5458 (ĉe Doi)



Tendaraj tagoj

tri kajeroj

- specife por junuloj 10- ĝis 14-jaraj
- speciale emfazas parol-kapablon
- alloge ilustrita de Pavel Rak
- kun notoj por instruistoj



Verkis Stefan MacGill.
Eldonis ILEI/UEA/HJEA.

Prezo: 12,00 gld. por la unua, 15,00 gld. por la dua kaj 18,00 gld. por la tria kajero. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA.

THE BILINGUAL FAMILY NEWSLETTER



Redaktisto Marjukka Grover
Akademia Redaktisto George Saunders

"Mia edzo kaj mi multe ĝuas la Bilingual Family Newsletter. Bv. daŭrigi la bonegan laboron!" Nadine Lichtenberger, Aŭstrio

Revuo kiu okupiĝas pri ĉiuj temoj gravaj al interkulturaj homoj, kiel la problemoj kaj rekompencoj de dulingva edukado de infanoj, vivado en interkultura geedzeco, kaj hejmiĝo en fremda lando. Anglalingva. Petu specimenan ekzempleron hodiaŭ!

Multilingual Matters Ltd., Frankfurt Lodge, Clevedon Hall,
Victoria Rd, Clevedon, Avon, Anglio BS21 7SJ
Tel: +44 (0) 1275 876519 Fax: +44 (0) 1275 343096

Ĉapelilo 1.0

Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsisistemo kaj manipulado pure en Esperanto. Ankaŭ por novuloj facilege majstrebla. Esperantaj kaj nacilingvaj signoj sur ekrano kaj printilo. Skaleblaj tiparoj por ĉiuj aplikoj. Ĉiuj necesaj funkcioj por alloge aranĝi vian tekston. Literumad-kontrolilo baze de redakteblaj vortaroj kun pli ol 120 000 vortoj. Disadresada funkcio. Importo kaj eksporto per diversaj formatoj por interŝanĝo. Grafikaĵoj integreblaj.

Enkonduka prezo nur 200 germ. markoj plus ekspedo. – Tuj mendu! Esperanto parolata!

Tel: +49-6081-66722, faksilo: +49-6081-3955, reto: 100103.24@compuserve.com
Professional Consulting, s-ro PEJNO Simono, Am Füllgarten 4, D-61250 Usingen

Patrina koro

Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La
Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./
preso). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 72,00 gld.
Institucia abono: 152,00 gld.
Abonu pere de la Libroservo de UEA.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- *Kontakto*;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭkazajn servojn kaj publikajojn.



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton, donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio de profesia terapiisto *Masayuki Saionji*.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita. Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.


Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko, CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1995 **KONTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1995

Aŭstralio	30 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugalia	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	30000 liroj	Svedio	170 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

TEJO lotumos valorajn premiojn inter ĉiuj abonantoj. Bonŝancon!

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

JAM PLI OL 1000 VENDITAJ!



Nova Esperanta Krestomatio


redaktita de William Auld

- klasikaj ekzercoj
- originalaj rakontoj
- ĉerpaĵoj el la mondliteraturo
- studoj "el vivo kaj sciencoj"
- prilingvaj artikoloj

kaj du unikaj antologietoj:

- La Esperanta Muzo (la Majstro, la lingvo, la Ideo, sati-ro)
- Internacia Liriko (specimena poemaro el 73 lingvoj)

Jubilea Kolekto n-ro 5. 509 p. 21 cm. Tole bindita kun kromkovrilo kaj paĝosigno. 57,00 gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Mi estas lingvistino-esperantistino el Germanio okupiĝanta pri la frazeologio de Esperanto (t.e. pri parolturnoj, proverboj kaj aliaj fiksitaj esprimoj). Ĉar miaj esplorrezultoj pri tiu temo estu tiel realaj kiel eblas, mi per tiu ĉi enketilo turnas min al la membroj de la Esperanto-komunumo. Bonvolu respondi la subajn demandojn kaj subtenu tiamaniere la sciencan studon pri temo ĝis nun nesufiĉe esplorita. Dankon.

Unue bv. noti la sekvajn indikojn:

- a) Respondu la demandojn individue, ne diskutinte ilin kun alia(j) persono(j)
- b) Ne konsultu vortaron aŭ alian helpilon
- c) Ne hezitu aldoni komentojn se vi rigardas tion necesa.

La enketilo estas anonima. Vi ne devas informi pri via nomo kaj adreso, se vi tion ne deziras. Tamen, por ĝuste prijuĝi la respondojn necesas scii ion pri la respondinto:

- (1) gepatra(j) lingvo(j):
- (2) lingvo(j) ĉiutage uzata(j):
- (3) Kiaj vi taksas viajn konojn de Esperanto? (metu krucon)
- (3a) komencanto ... (3b) mi bone parolas ...
- (3c) mi regule praktikas la lingvon skribe ... kaj parole ...
- (4) Kiujn aliajn lingvojn vi parolas?
- (5) Kiujn aliajn lingvojn vi lernis?

A. Bv. analizi la sekvajn frazojn/titolojn. Se ili kaptas vian atenton aŭ memorigas vin pri io, substreku la respektivajn vortojn kaj klarigu kial.

- a) ... sed la Akademio restis je sia pozicio ne ŝovi la nazon en politikan vazon.
Frapas, ĉar ...
- b) Laste aperis: Adrian Tom Brown, nask. 15-01-95, 48cm, 2840g. Ĝojas la feliĉaj gepatroj... (anonco)
Frapas, ĉar ...
- c) ..., publike mi petos pardonon de ili, ĵetos pento-fare cindron sur mian kapon kaj honte kaj pied-pinte forlasos ...
Frapas, ĉar ...
- ĉ) Ne al glavo sangon soifanta ... (titolo de artikolo)
Frapas, ĉar ...
- d) ..., kaj esperanto plu vivos en nia lando, kredu min, d-ro ...!
Frapas, ĉar ...
- e) La Lucerna Ponto mortis, vivu la Lucerna Ponto!
Frapas, ĉar ...
- f) Mi levas la ĉapelon por Laŭlum, kiu sukcesis...
Frapas, ĉar ...
- g) Por ke romano estu klasika ... (titolo de recenzo)
Frapas, ĉar ...
- ĝ) Taskas nin nova jarmilo (titolo de artikolo)
Frapas, ĉar ...
- h) Pirono Klaŭdo kaj la malbona lingvo (librotitolo)
Frapas, ĉar ...
- ĥ) En Irano - obstino, espero kaj la pacienco (titolo)
Frapas, ĉar ...
- j) Tiu agado reliefigas la kap-klapecon de la registara programo.
Frapas, ĉar ...
- ĵ) Se la verda movado ne ekzistus, necesus krei ĝin.
Frapas, ĉar ...

B. Bv. klarigi la signifon de la sekvaj gestoj en Eo (ekz.: signo de minaco, de ĉagreno)

- a) ŝiri al si la harojn
- b) froti al si la manojn
- c) grimaci per la okulo
- ĉ) grati sin post la orelo
- d) plenblovi la lipojn
- e) mordeti al si la lipojn
- f) fari la dikan lipon
- g) leveti la brovojn
- ĝ) froti al si la ventron

C. Ĉu vi konas la sekvajn frazeologismojn? (metu krucon, se jes)

	Mi konas la esprimon			Mi ne konas ĝin, sed mi povas dedukti la enhavon	Mi ne konas ĝin kaj ne povas dedukti la enhavon	La signifo/ situacio estas: (se necesas, uzu suplementan folion)	Mi mem uzis tion skribe/ parole	
	el mia gapa- tra lingvo	el Eo	el alia fremd- lingvo					
Nova balailo bone balaas.								
fajfi pri io								
pasi akvon kaj fajron								
fiŝi en malklara akvo								
frotita kaj polurita								
Infano ne krias, patrino ne scias.								
la eterna triangulo								
Ŝiriĝis fadeno sur la bobeno.								
Fungon englutis!								
Putrado de fiŝo komenciĝas de 1' kapo.								
reiri hejmen sur la ĉevalo de Sankta Francisko								
eterna komencanto								
En abeluojn ne blovu!								
plendi en la kuirejo								
konduki iun je la nazo								
Jen la tubero en la afero.								
koni iun kiel makulharan hundon								
ne esti de hieraŭ								
La tero similas al vilaĝo.								
gladi al iu la pantalonon								
Se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero.								
Akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras.								
bruligi siajn fingrojn								
Unu hirundo printempon ne alportas.								
sidi sur pingloj								
Je sankta Ludoviko!								
ĝisi kaj kisi								
verda papo								
jeti al iu polvon en la okulojn								
tago de la malfermita pordo								
talpa laboro								
kalkuli muŝojn								
Arbaro aŭdas, kampo vidas.								
Pluvo en Aprilo - por la tero utilo.								
esti verda de jaluzo								
Vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon.								

Mi elkore dankas al vi pro via kunlaboro kaj petas sendi tiun ĉi enketilon al mia adreso: Dr. Sabine Fiedler
Riesaer Str.5
D-04328 Leipzig